

Senŝtacia Revuo

Ne ekzistas fremda popolo. Estas nur homoj. Sole la lingvoj diferencas, kaj tio estas malnoble eksplutata.
Andreas LATZKO.

Organo de la
Tutmonda Laboristaro

ANTAŬ'E
ESPERANTISTA LABORISTO

Jara abono: Anglio, 5 s'il; Aŭstrio, 150 kr.; Belgio kaj Francio, 9 fr. fr.; Bulgario kaj Rumanio, 30 lev.; Ĉeko slovakio kaj Jugoslavio, 25 kr.; Danio, Norvegio kaj Svedio, 6 kr.; Germanio kaj Finnlando, 25 mk.; Hispanio, 7 pes.; Hungario, 60 kr.; Italio, 12 lir.; Nederlando, 3 g.; Polio, 300 mk.; Svisio, 6 sv. fr.; Usono, 1 1/4 dol. Oni pagu prefere per monbiletoj aŭ bank'ekoj. — La abonoj komenciĝas en Januaro kaj Julio.

REDAKCIO: E. LANTY

24, Boulevard Beaumarchais — PARIS (Francio)

ADMINISTRACIO: L. GLODEAU

177, Rue de Bagnolet — PARIS (Francio)

Noto de l' presisto

Pro tio, ke ni ne jam ricevis *c'iujn* supersignojn, kvankam ni mendis ilin antaŭ tri semajnoj, ni anstataŭis ilin per apostrofo post la supersignitaj leteroj.

Ex: mang'i, humoraj'o, antaŭ'. Pro tio, ke la apostrofo estas facile rekonebla, c'i tiu presmaniero alportos nenian konfuzon.

Ni plej certe havos la supersignojn por la plej proksima n-ro.

Pri tiu bedaŭrinda prokrasto, la legantoj bonvolu pardoni la Redakcion de S. R. kiu estas tute ne kulpa. Kulpa estas nur la fandisto, kiu estas tre..... nerapida. Tia prokrasto ne plu okazos.

La Presisto.

REAKCIO

Eble vi estas aŭdintaj la maljunan anekdoton pri unu germana censaro¹ kiu kredis, ke li povas haltigi Donauon² je g'ia fluado.

Promenante supre en la montaro Schwartzwald tiu persono foje alvenis al prafontoj de Donauo, kiu de tie, komence kiel tre malgranda rivereto, ekfluas direkte al la maro. Tiam la censaro, pripensinte momenton, ekkaptis sagacan ideon. Kun siaj larg'aj muskoloj li sidig'is mezen de rivereto, kaj vidinte, ke

(1). la magistrato.

(2). Mezeŭropa rivereto, kiun oni ankau' nomas Danubo.

sia korpulenta estaj'o dum momento baris la akvon fluantan, li g'oje aplau'dis kaj ekkriis: « Kiel surprizig'intaj nun estas ja Wienaj log'antoj vidintaj Donauon eksekig'intan meze de la c'efurbego! »

Poeto tiel ironiadis pri la reakcio, kiu regis plej malbone Eŭropon en la lasta jarcento, post la milito de Napoleono. Kaj tiel same la anekdoto dau'radas ankoraŭ hodiaŭ'.

Kiam post la revolucio de Francio la grandaj tumultoj kvietig'is, tiam imperiestroj de la grands'tatoj faris la « sanktan aliancon », ligan por konservado de « felic'o » de popoloj. Sed tiu c'i ligo estis vere nur preteksto al la regantaj eminentuloj, kiuj en ties ombro terure perfortis kaj persekutis ciujn progrese majn homojn postulantajn iom da libereco kaj justeco al la popoloj. Plej intuicaj reprezentantoj de tiu c'i persekutado estis censaroj kaj g'endarmoj, el kiuj la antaŭaj uzis kaj premis la katenojn de pens-kaj vortlibereco kaj la postaj trenis la politike malfiditajn personojn en malliberejojn kaj ilin pendigis aŭ ekzilis.

Tio c'i okazis malgrau' tio, ke tiama « revolucieco » estis limigita tute en burg'araj kadroj. Ne estis ankoraŭ ec' iomete sciig'itaj la postuloj de la nuntempa socialista movado, sed la demando koncernis nur la levig'adon de novnaskita burg'aro kontraŭ la malnova feŭdala nobelaro. Oni volis nur krei pli bonajn premiojn kaj bazojn por la libera ekonomia konkuro en la socio, fundamentojn al la nuna sistemo kapitalista.

Oni volis formi tian socian staton, kiu konformig'us al la komencanta kapitalismo, helpus la progreson de grandindustrio kaj g'enerala interkomunikig'o. Tiuj-c'i pioniroj de kapitalismo estis siatempe ankau' « revolucianoj » kaj kontrau' ili la registaroj en c'iuuj landoj direktis siajn armilojn de reakcio.

Sed vane. La historia evoluado estis pli forta ol la klopodoj de reakciuloj. Burg'araj liberaj ideoj iom post iom ricevis sian rajton en okcidenta kaj meza Eu'ropo kaj la burg'ara reg'imo forpus'is la feu'dalan socian sistemon, c'ar tio estis historie necesega. Por la vivigo de produkto industria sur la bazo de libera konkuro estis bezonita iaspeca demokratio, t. e. iom da primitivaj civitanaj rajtoj. Sed antau' c'io oni deziris tutan liberecon por ekspluatado kaj por kreado de ekonomiaj entreprenoj. La reganta nobelaro ne povis sufoki tiun c'i tendencon, kiu siatempe signifis progreson rilate al la antau'a socia reg'imo.

Sed la grandado de socia evoluo estas plue rapide movig'inta. La nunaj sociaj sistemformoj estas jam vivintaj sian tempon kaj plenumintaj sian taskon. La kapitalismo, kiu siatempe estis kiel ekscitilo por progreso, estas jam nun ig'inta malhelpo por evoluado de la mondo. G'i ne plu kontentigas la vivbezonojn de nuntempo kaj estonteco. Nun g'i reprezentas nur estintecon, kaj tial g'i jam havas jug'on historian. La estonteco traboras jam sian vojon per la socialismo. Tial subtenantoj de burg'ara s'tatpotenco persekutas tiel fervore socialismon en c'iuuj landoj. Kaj ju pli forta kreskos laborista mavado, des pli nigrajn armilojn uzos la reganta burg'aro por la reakcio c'ie en la mondo.

Sed kiella subtenantoj dela maljuna feu'dala sistemo neniel povis fine malhelpi la levig'on de burgar'o, tiel ankau' pro la samaj historiaj kau'zoj estas neeble, ke kapitalismo venkos socialismon au' malhelpos g'in je g'ia fina celo. C'ar oni ne povos c'esigi la evoluadon. Per la kruelaj persekutoj kaj perfortoj, kiujn la burg'aro estas arang'inta en c'iuuj kapitalistaj landoj, oni povos ja malakceli la progreson kaj pliigi la senlimajn suferojn de la mondo, sed tamen per tiaj rimedoj estos nenio venkita. Tiaj faradoj povos esti komparitaj al penado de la censara reakciulo, kiu kredis, ke li povas per sia propra korpulenta persono obstrukci la Donau'ajn fontojn.

A. P. (Finnlando).

Esperanton uzu parolante, studu legante kaj ne fus'u skribante.

Atentu, ke internacia lingvo vivas nur per uzado; memoru, ke tial internacia organiaz'jo estas necesa: senlace varbu per S. A. T.

LA GAZETARO PRI LA XIII^A

Tre mallonge kaj severe ni raportis en la lasta n^o pri la Praha Kongreso. En c'i-tiu ni volas liveri al nia legantaro kelkajn opiniojn el la esp. gazetaro.

G'enerale la gazetaj raportoj estas entuziasmaj lau'doj, banalaj'oj milfoje ripetitaj de kiam okazis esp. kongresoj. Tamen c'iuuj raportintoj ne perdis absolute sian observemon kaj iafoje senatente liveris « perlojn » elmontrindajn.

En la fagordo k'usis la grava demando pri la organizado de la Esperantistaro. Nu, estas fakto, ke la « Kongreso » (?) ne trovis solvon kaj ec' serioze ne diskutis la aferon. Tion notas s^o H. K. Bouska en la n^o 3-4 de « Cekoslovaka Gazeto »:

« Interne la kongreso neniel superis c'iuja aliajn; ankau' g'i estis same senenhava kiel c'iuuj niaj kongresoj, kiuj preferas esti pli manifestacioj ol laboraj institucioj. Kiel c'iuuj aliaj — pasintaj kaj kredible venontaj — ankau' tiu c'i kongreso estis sen firma programo kaj lau' tio estis ankau' aspekto de » laboraj « kunsidoj. La plejmulto ne atentis ilin, oni parolis al negranda kunvenintaro lau' sia plac'o — kvazau c'iuuj sentus, ke c'io estas senbezona, c'ar au'guroj faros c'ion ankau' lau' sia plac'o... »

C'u do oni laboris pli serioze c'e la kunsidoj de U. E. A. ? Jug'u, legantoj, lau' la diro de « Germana Esp. isto » (n^o 8-9).

« Posttagmeze okazis la dua laborkunsido de U. E. A. Nur tridek personoj c'eeestis. Senc'ese kelkiuj mars'etis tra la ejo malfermante fenestrojn, ree fermante ilin, s'ang'ante la sidejojn kaj elirante por trinki refres'igan limonadon. Kelkiuj ec' dormante ronkis au' dormeme oscedis. Estis kortus'anta aspekto! Nek ni nek la estraro, kiu trinkadis multege da akvo, estis laboremaj. Pri gravaj punktoj oni sendube ne parolis, c'ar neniu aplaudo vekis nin el niaj dolc'aj revoj. Fine mi nur au'dis, kiam la prezidanto fermis la kunsidon ». (Max Butin.)

Se la estraro de U. E. A. ne estis laborema almenau' g'i estis festenema, kaj « The British Esperantist » (n^o 199) preskau' lau'das g'in pro tio.

« Tre ofte la plej gravaj decidoj de la diplomatio kaj de s'tataj aferoj okazis c'e mang'otablo, kaj dum c'i tiu kongreso okazis tre grava vespermang'o, en kiu la estraro de U. E. A. festenis D-ron Benes', la C'ehoslovaka ministro de la alilandaj aferoj, D-ron Nitobe, el la sekretariaro de la Ligo de Nacioj, S-ron Horner, reprezentanto de Rug'a Kruco, kaj S-ron Blumel, reprezentanto de Internacia Labor-oficejo. C'i tiu festeno prezentis unikan okazon por klarigi la pozicion de nia movado c'e tiuj eminentaj gastoj kaj aliaj invititoj, kaj estas certe, ke g'i alportos al nia afero efikajn rezultatojn en la estonteco ».

Nu, bone, la « Eminentuloj » ripozas laborante, kaj laboras festenante! . . .

La esp. kongresoj montras, ke la parola kaoso estas forigita el sia sino, sed aliflanke ili vidigas plej grandan ideo-kaoson. Kiel pruvo pri tiu aserto oni nur komparu la opinion de S^o-Ramaryt, prezidinto de la Kongreso, kun la c'i-supra citaj'o:

« La venkintaj s'tatoj arang'is festaj'ojn je honoro de la nektonata batalinto de la mondmilito. Bone ili faris, c'ar estas ofte la sennomaj batalantoj, kiuj alportas la venkon, ne la

g'eneraloj, eĉ en la milito. Des pli malmulte en la batalo, kia estas la nia poresperanta batalo». (El « Esperanto » n° 9-10).

Pri la organizado de l'Kongreso multe da kritikoj troviĝas en la gazetoj. Kelkaj notas, ke iu angla samideano diris, pri la ekskurso al la Moravio grottoj, ke li « jam spertis multon dum sia sesdek-jara vivo, sed neniam tian fus'aj'on. »

S^o Ellersiek, en sia « Esp. o-Praktiko », kritike raportas pri la malbona organizado de l'Kongreso kaj recipe pri la naciismo de la C'eh'oj — forgesante pri la Jesua diro: Hipokritulo, el'etu unue la trabon el via okulo, kaj tiam vi klare vidos, por eltiri la lignereton el la okulo de via frato». Tamen oni ne povas nei, ke la germana naciisto havas akran observemon. Pri la lau'tlegado de la raporto pri Int. Organizo de Esp. istoj: « S'ajne g'i ne multe interesis la c'eestantaron, c'ar c'i tiu estis ne au'skultema kaj tiel movig'ema, ke la prezidanto devis interrompi la parolanton kaj energie peti silenton, almenaŭ pro g'entileco al la raportanto kaj al la komisiono, kiu en tre malfacilaj cirkonstancoj starigis tiun proponon pri organizo. Estas strange: dum multaj jaroj oni jam diskutas kaj disputas pri la organiza demando, kaj nun, kiam reala propono pri g'ia solvo estas farata, oni tenas sin, kvazaŭ g'i estus informo pri iu malgrava afero, kiu ne koncernas la kongresanojn. C'u niaj internaciaj kongresoj restu nur demonstracioj pri la ekzistado de esperantistoj, au' c'u ili fine farig'u ankau' decido-povaj institucioj en nia movado? Mi opinias, ke c'i tio vere estas pli grava por la progreso de nia movado ol tio. »

Pri la teatra prezentado, kiu okazis en la Urba teatro de Vinokrady: « Mia edzino estis pli sag'a ol mi, resignante kuniri, c'ar estis perdita vespero. Esperantistaj diletantoj ludis la triaktan (historian) komedion „Nokto en Karluv Tyn“ (Karls'tejn) de Jaroslav Vrchlicky, tradukitan de Milos Lukàs. Eĉ la Esperanto-redaktoro de Prager Presse diris en sia raporto, ke la komedio ne estas la plej bona de la c'eh'a verkisto, kaj la au'skultantoj de la Esperanto-traduko ankoraŭ pli multe sentis la neperfektecon de la verko. G'i enhavas malmulte da agado, sed c'efe nur longajn dialogojn, kiuj, se ili efiku, estu prezentataj de profesiaj aktoroj. La diletantaj aktoroj ja klopodis, kiel eble plej bone plenumi sian malfacilan taskon, sed ili ne sukcesis. Nur du el ili (Josef Bunzl kiel imperiestro Karolo IVa kaj Anjo Hodiková kiel nevino de l' kastelestro en siaj roloj iom superstaris la diletantismon. La au'skultantaro estis kontenta, kiam la kurteno post tri horoj definitive fermis la scenejon. »

La Kongreso decidis okazigi la XIV^{an} en Helsinki. Tiu decido antaŭarang'ita de la « au'guroj » jam au'digas protestojn flanke de germanoj, kiuj deziris, ke g'i okazu en Danzig. En la n° 10 de « Germana Esp. tisto » oni povas legi pri tio:

« C'u oni forgesis, kela XIV-a estis projektita por Danzig? Kial S^o Retterling en Praha ne publike, oficiale kaj plej akcente invitis la XIV-an al Danzig?... Oni diras, ke certaj personoj klopodis malebligi la XIV-an en Danzig... La tuta esperantistaro, kiu volonte vizitus la XIV-an, sed ne estas sufic'e bonstata por iri al Helsinki, postulas klaran kaj veran respondon, por, se eble, ankoraŭ nun estigi en la c'arma, interesa, vidinda kaj malmultekosta urbo Danzig la XIV-an, kaj en Helsinki la XV-an dum tempo, kiam la valuto estos almenaŭ iomete pli „antaŭmilita“.

Sed estas nekonvene vidi c'ion per okuloj de l'pesimismo, Pli bone estas meti sur sian nazon okulvitrojn de l'optimismo. kiel faras Ed. Privat en « Esperanto » n° 9-10:

« El c'iuaj Kongresoj la XIII^a estis plej harmonia. Plene forestis partioj kaj regis admirinda unueco. »

Statistiko pri la kongresanoj. Al la Kongreso alig'is entute 2561 anoj, el 35 landoj: C'eh'oslovakio 1406, Germanio 289, Svedio 111, Francio 91, Au'strio 83, Britio 78, Nederlando 73, Polio 72, Danio 43, Hungario 43, Italio 43, Bulgario 32, Svisio 32, Jugoslavio 27, Hispanio 27, Belgio 19, Finnlando 14, Norvegio 12, Rumanio 11, Dancigo 6, Ruslando 3, Ukrainio 3, Usono 3, Japanio 3, Argentino 4, Litovio 3, Kanado 3, Au'stralia 3, Estonio 2, Turkio 2, Kubo 2, Alg'erio 1, Sudafriko 1, Brazilio 1, Urugvajo 1. — El tiuj c'i preskau' 400 ne petis persone siajn kongresdokumentojn, lau' kio oni devas jug'i, ke efektive partoprenis 2200 ne kalkulante multaj familianojn sen kartoj.

Vojaĝ'-Kongresimpresoj kaj Rimarkoj

(SEKVO)

Kladno

31. — De Praha al la stacidomo de Kladno unuhora veturado proksimume estas necesa, kaj poste oni bezonas 3/4 horan mars'adon por atingi la urbon.

Je la 10^a matene jam K^{do} Stribrsky kondukis min al la redakto de « Svoboda » organo de la tiea komunista Partio. La c'efredaktoro, k^{do} Al. Broz, ne c'eestas; li estas ekstere prizorganta la arang'ojn de la tuj okazonta demonstracio. K^{do} B. Skuthan, la dua redaktoro, akceptas min. Tuj vidig'as la malfacilaj'o, kiun okazigas malsamlingveco. K^{do} S. devas traduki esperanten kaj tio igas la interparoladon peza, teda, konfuza. Nur deziro sciig'i pri la movado komunista en niaj respektivaj landoj kapablas dau'rigi la konversacion. K^{do} Skuthan rakontas pri la lasta ribela movado en C'eh'oslovakio, pri K^{do} Muna, nun enkarcerigata, ktp. Kun intereso mi sciig'as, ke la c'eh'oslovaka komunista Partio, malgrau persekutoj de l'registar'o, estas tamen en la lando la pli forta organizaj'o. G'i enkalkulas pli ol 400.000 membrojn.

— Kiom enhavas la franca Partio demandas min k^{do} Skuthan?

— Apenau' 120.000, preskau' honteme mi respondas. Kaj mi devas klarigi, ke la Francaj ne estas anig'emaj, ke malgrau' tiu malgranda membronhaveco la Kom. Partio estas ankau' la plej forta organizaj'o politika en Francio.

K^{do} Skuthan konfesas, ke la Internacio nepre bezonas komunan interkomprenig'ilon. Li antau' kelkaj jaroj komencis l'erni esp. on, sed tuj kiam li au'dis pri ido li c'esis. Ni devas trovi solvon, li aldonas.

Du Delegitoj j'us alvenintaj el Rusio envenas. Mi tre dezirus demandadi ilin, sed la malbenita lingva baro retenas min. Ni nur sciig'as, de ili, ke la III^a Kongreso en Moskvo alprenis rezolucion pri Lingvo Internacia. Cetere forflugas la tempo. Jam la stratoj plenig'as de la gimnastikistoj.

— Ni iru al la Urbdomo, diras k^{do} S., tie certe ni trovos Broz..

Ni preterpasas densan amason defilantan (1) en perfekta ordo. Jen aro da junuloj duon-nudaj (nur mallonga pantalono kovras la mezon de l'korpo, la hau'to brunigita kaj hardita de la suno; jen roto da nudpiedaj, nudkapaj, nudbrakaj junulinoj kun fortikabrusto s'veliganta la maldikan korsaj'on; jen laboristoj, kamparanoj portantaj kiel emblemojn siajn laborilojn; jen grupo kun standardo sur kiu estas brodita la porteto de Karl Marks; jen alia kun la insignoj de la III^a Internacio; Jen bataliono da knaboj, jen sed c'u estas eble vidi c'ium detalon de tiu granda armeo? Mi vidas nur imponan mars'adon de homoj kun serioza mieno, kun kvazau' hieratika (2) sintenado. Kio igas tiun demonstracion pli impona al mi estas la penso, he tiuj homoj venis c'i-tien memvole. Neniu sanga leg'o envicigis ilin en tiu armeo. Nenia servuteco, kiel estas en militistaro, sed nur memvola disciplino regas c'i-tie.

K^{do} Stribrsky klarigas mil aferojn. Mi penas au' skulti, sed vere mi ne au'das. Vagas for mia spirito. Pense mi reprezentas al mi militistajn revuojn, religiajn procesiojn. La unuaj pugnis al mi la manoj, la duaj alvenigis sur miajn lipojn kompateman rideton. Kaj nun mi sentas min treege emociata. Subkonsciaj fortoj prilaboras mian skeptikecon kaj faras el mi entuziasmulon.

Individua animo ne povas longe konstru' stari la popol amasan animon. C'u do la c'efoj kondukas la amason, au' c'u ili estas de g'i kondukataj? Malfacile solvebla problemo. Eble samkiel oni ordonas al la naturo obeante ties leg'ojn, same ankau' la kondukantoj de la amasoj ordonas al ili nur obeante ties konfuzaajn aspirojn.

Mezvoje al la Urbdomo ni renkontas k^{don} Al. Broz. Tio tiras min el mia revado. La c'efredaktoro de « Svoboda » parolas iom en esperanto kaj komprenas preskau' c'ion. Nur lia granda okupateco malhelpis, ke li lertig'u en nia lingvo. Ni povas do, nehelpe de tradukanto, iom interhabili. Tio estas tre agrabla. Malgrau' sia afableco k^{do} Skuthan restas al mi iom frenda dum mi sentas min tuj en frata atmosfero kun k^{do} Broz.

Tiel babilante ni do alvenis ĉe la Urbdomo staranta sur la Wilsona placo. La urbestro forestas, c'ar li ne estas komunisto. De kiam okazis la lasta baloto, treege aliig'is la spiritistato de la enlog'antoj. Tion scias lia urbestra mos'to kaj tial li permesas al la gvidantoj de la Kom. Partio agi kvazau' ili estus jam la oficialuloj. Tiel ni c'eestas nun en la forlasita urbestra c'ambro kaj tre amuzig'as pro la stranga situacio.

Post defilado tra c'efaj stratoj de la urbo la gimnastikistoj orde kolektig'as sur la placon. Baldaŭ g'i estos plenplena. Kiom da c'eestantaj? 20-30-40.000? Estas malfacile kalkuli c'iujn tiujn movig'antajn kapojn. Ne grave! Kio certa, estas ke la placo apenau' povas enteni la tuton « Sokolaron » (3) kiu entuziasme, sub ardanta suno, montras sian vigecon, sian emon al memvola disciplino, sian volon al plibonigo de la socio.

(1) Defili (Boirac) paradmars'i.

(2) Hieratika (Boirac) rilata al sanktaj'oj.

(3) Sokol (ĉeh'a vorto) falko. La « Sokolismo » estas apartaj'o de la c'eh'oslovoka nacio. La inciantoj de tiu movado estis naciistoj. Ili tiam ne supozis, ke iun tagon la komunistoj povos profiti de ilia organizado.

Alpas'inte sur la balkonon, k^{do} Skuthan per forta voc'o alparolas la popolon. Mi komprene ekkaptas kelkajn vortojn: *proletari, komunistu, revoluce, Ruska, internacionaly*, kiuj punktigas la paroladon, kaj jen kvazau' terurigitaj mi komprenas, ke *soudruh* k^{do} Adam z Parize, Froucouz, devos tuj montrig'i antau' tiun popolamason.

— Kara leganto, c'u vi jam eltirigis al vi denton? Se jes, vi povas imagi en kia sanstato mi estis alpas'ante la balkonon.

C'e mia ekapero tujau' dig'as grandega aplau'do... Kiel membro de la fr. Kom. Partio mi parolas en esp. o kelkajn salutvortojn kaj atentigas, pri nepra neceseco de komuna interkomprenigilo por ke la Internacio estu firme bazata kaj vivkapabla. La amaso komprenis nenion, sed tamen aplau'das, kaj ree kiam k^{do} Broz estas tradukinta c'eh'en. Sinsekve aliaj k^{doj} parolas. Kvankam ne komprenante, mi tamen estas tre emociata. Mia animo dronas en la kolektiva animo de la popolamaro.

Post la demonstracio la sokoloj tagmang'as, ripozas kaj preparig'as por la posttagmeza gimnastikado. C'iuuj trinkejoj, restoracioj estas plenplenaj. Sur trotuaroj, en kortoj, c'iuoke vidig'as kau'rantaj mang'antoj. La spektaklo estas ege observinda, vere pentrinda.

K^{do} Stribrsky volas gastigi min, sed lia edzino formalaperis el la hejmo opiniante, pro nia malfruig'o, ke la edzo ne venos por tagmang'i. Fine k^{do} Broz trovis por mi lokon c'e la Popoldomo kaj oficis kiel servisto por havigi al mi mang'aj'on...

Retroirante al Praha mi kunportas neforgeseblan bildon pri vigla popolo, plena je entuziasmo kaj fidanta al nia estonteeco. La Kladoa Sokolaro farig'is forta armeo je la servo de l'komunismo.

Praha

(1 - 2 - 3 - 4 - 5 - au'gusto) Pasis la tagoj en kunsidoj, promenadoj, vizitoj. La Kongresa semajno lasas al mi nur memoron pri granda konfuzo, pri varmegeco, pri nedormado pro sangavidaj cimoj, pri forta sopiro al soleco en sovag'a arbaro.

Nedubleble la XIII^a montris unufojon pli, ke la lingvaj baroj estas faligitaj inter la esp. istoj. Sed aliaj baroj pli malfacile faligeblaj staras inter la diversklasaj, diverspartiaj « samideanoj ». Vane la hibridecaj c'efoj de Esperantio sukcesos harmoniigi framasonojn kun katolikoj, komunistojn kun reakciuloj. Tia granda mensogeca entrepreno fari'g'as pli kaj pli nebla, proporcie je la disvastig'o de esp. o. L. *esperantismo* povas nur kontentigi la malnovajn pionirojn, kiuj bonkrede vidas en esp. o panaccon. Interkonsento estas ebla, almenau' dezirinda, nur je teknika vidpunkto. *Nur fakaj organizaj'oj povas trafe kaj efike propagandi nian lingvon.*

Wien

6 — Je la sepa matene K^{doj} Guihéneuf, Hugot kun siaj du komunistaj akompanantoj, Révo, lia edzino kaj mi trovig'as en vagonaro veturonta al la c'efurbo de Austrio.

Adiau' Praha! C'e mia ekveturo mi nur konsciig'as pri cia beleco. Mi kunportas vidon memorigindan pri c'iaj cent turoj, pri cia bela rivero *Vltava* en kiu centoj da ambau'seksaj

homoj kun sune brunigitaj korpoj sin banas meze de la urbo au' nude veturas en malgrandoj kanotoj; pri c'iaj historiecaj stratetoj; pri Jan Hus, kies granita tempomaltimanta monumento montras al la homoj la dang'eron de la religia fanatikeco — Kaj la patriota, ec' la revolucia??!. Adiau' Praha! dau'rigu infanece ludi per cia nacia liberig'o (!), g'iskiam cia popolo komprenos, ke la nacia memstareco estas nur iluzio en epoko de kruda imperialismo kapitalista.

Per la sama vagonaro kunvojaĝas la karavano partoprenonta la Wienan «Esp. o-Semajnon». — al kiu mi ne alig'is. Mi sopiras izolecon; mi ne s'atas, ke oni konduku min de vidindaj'o al vidindaj'o. Mi deziras promeni sen difinita programo, je mia bontrovo. Vido de bela monumento iaf'oj te das min, dum tiame mi kun intereso observos longtempe plej sensignifajn aferojn. Mi volas mars'i kaj halti kiam plac'as al mi. K^{do} Guihéneuf, kiu kunvojaĝas estas ankau' tia strangulo. Okazas ofte, ke disigite ni promenadas. Aro' da du personoj estas por ni tro granda! Komprenu se vi povas arig'emuloj kaj ne tro koleru pro nia «sovag'eco». Ni tute ne deziras, ke vi imitu nin.

Je la 13 1/2 ni elvagonig'as en Wien kaj tuj, post rapida adiau'o al la kunvojaĝ'antoj, ni forkuras al serc'ado de hotelo.

7 — Promenante tra la urbo kelkloke mi ricevas impreson kvazau' mi estus en Paris: Belaj, grandiozaj monumentoj, larg'aj stratoj. Altaj domoj. Kvankam butikoj kaj magazenoj estas plenaj de komercaĵoj, en multaj detaloj oni tamen sentas grandan mizeron.

La hazardo ironie alkondukas min c'e la hotelo «Münchenlof», kie tagmang'as la esp. a karavano. Nu, bone, mi spertu kiel iras la afero c'i-tie.

Certe oni sentas sin tre komforta en c'i-tiu eleganta restoracia salono. La mang'aj'oj esta bongustaj. Au'dig'as bela muziko. Kaj vere S^o Zimmerman (social-demokrato) estas prava kiam li lau'das la kunlaboradon de c'iaj wienaj resp. istoj en la «Delegitaro». Nur «frenezulo» povas paroli pri klasbatalo en Esperantio.

Fulmotondro! kiel diras niaj Dresdenaj k^{doj}, kial do la kelnero postulas de mi 900 kronojn (*) por la mang'o, tiel rememorigante al mi, ke esp. proletarioj ne povas partopreni en tia lukre arang'ita «komuna tagmang'o». Sed pri tio S^o socialista (?) Z. ne atentadas!...

8-9 Mi precipe venis Wienon por vidi proprokule la I^{an} Idistan Kongreson. En la pos'o mi havas «Ido-Korespondo-Revuo» en kiu estas presita la programo. Bedau'rinde mankas la adreso de la kongresejo. Hiérau' la tutan tagon mi vaue serc'is la lokon kie kunvenas nia «mi-frati». Fine hodiau' mi ekvidis afis'ojn alvokantajn al c'eesto de porida propagand kunveno.

Je la 20 a 1/2 mi sidas en la kunveno kaj atenteme au'skultas la c'efojn de la Idistaro. Du sinsekvajn vesperojn mi venis ci-tien. Unue mi spertis, ke oni mensogis dirante ke la idistoj tute ne s'ir interkomprenas parole. Mi, kiu estas

nur okaza «idero» (*), komprenas c'ion parolatan. Sed ankau' mi spertas, ke la idistoj ne jug'as objektivaj kaj ne argumentas lojale. Ekzemple S^o Schneeberger, prezidanto de la ida Akademio, montras komparajn tabelojn pri esp.o-ido, kiuj estas preskau' malhoneste arang'itaj. Sur unu tabelo longaj kunmetitaj esp.o-vortoj estas metitaj kontrau' unuradikaj ido-vortoj. Nu c'iu' vortoj tie uzataj de ido trovig'as en la vortaro (Grojean-Manjin) kiun mi havas en pos'o! Religieca spirito ankau' regas c'i-tie: kiam sur la ekrano aperas la «sespinta stelo» sonas aplau'doj. Kvankam mi ne povis c'eesti la Kongreson mi tamen scias nun kion opinii pri la ida movado...

10-11. — Pasas la tagoj ne okazigante rakontindaj'on. La grandoj urboj tre similas unuj la aliajn C'ie la popoloj rakontas sian historion per monumentoj. Kaj c'ie la historio estas sama: G'i gloradas al militistoj, religiuloj, politikistoj. Venu la tempo kiam nur la paca *Laboro* estos glorata!...

Budapest

12. — Matene je la oka ni ekveturas per s'ipo al Budapest. Kelkfoje mi legis pri la «blua Danubo». Hodiau' mi vidas kretkoloran riveregon. Sendube la poetoj ne vidas per siaj propraj okuloj. Ilia muzo metas sur ilian nazon okulvitrojn montrantajn la objektojn lau' tute fantazia aspekto. Estas terure varmege. La s'ipo maldiligente lau'iras la fluon de l'akvo. Mezbela estas la pretervidata pejzag'o. Nur plac'as al mi la severa soleco de kelkaj lokoj, kie aroj da grandaj birdoj s'ajnas esti la solaj estuloj. De tempo al tempo oni tamen ekvidas bovojn kaj porkojn. Flosantaj muelejoj ankau' rememorigas pri homhaveco c'e la Danubaj bordoj. Je la 23^a ni fine alvenas c'e la c'efurbo de Hungario. Ambafluflanke de la riverego lumoj briletas. Imponaj konstruaj'oj, vualitaj de densa ombro, staras sur la fono. Neontesteble la vido estas belega, poeziplena.

Helpemaj k^{doj} el la Laborista Grupo atendas c'e la els'ipejo kaj kondukas nin al antau'zorgita hotelo.

Dek tagojn ni restis c'i-tie. Pruvo, ke la loko tre plac'is, Efektive Budapest, malpli grandioza ol Wien, aspektas pli elegante kaj akcepteme. Severa ordo regas en la lando. Oni sentas, ke fereca mano kondukas la aferojn. Admiralo Horthy estas certe granda politikisto. Kompare Bela Kun havis molan manon. Vane mi serc'is komuniston en la urbo. Ili forkuris au' estis j'etitaj de la «Vekig'antoj»⁽¹⁾ en la Danubon Antau' kelkaj monatoj oni c'utage elakvigis 5-7 kadavrojn. Tre efika estas la Blanka Teruro, instigata de S^{oj} Pronay. Héjos Friedrich Sos de episkoko Prohiaska Otakar kaj plenumata de lia admirala mos'to Horthy kun aprobado «Entento.»

Se la komunista movado estas enterig'ata — do subtera — kompensela esp. a estas tre vigla. La Laborista Societo enalkulas plio ol 500 membrojn. Mi partoprenis ekskursojn, c'estis kunvenojn kaj c'ie konstatis grandan entuziasmon kaj fortan Deziron antau' enpus'i nian aferon Malgrau' mizero, suspekto kaj persekutoj niaj Hungaraj samideanoj estas esperplenaj al définitiva venko de nia idealo. Estu vi elkore

(1) Notinda fakto estas, ke ceh'oslovaka s'lato konsistas el tre diversaj elementoj: C'ehoj: 5.800.000; Germanoj: 3.600.000; Slovakoj: 1.200.000; Hungaroj: 1.000.000; Poloj: 1.000.000; Rutenoj: 400.000 kaj multoj judoj. G'i, lau' plimalgranda skalo, similas la antau'militan Aŭstrian Imperion.

(*) En aliaj restoracioj estis eble tagmang'i por 200-300 kronoj.

(*) En ido la sufikso *er* signifas: *kiu praktikas*.

(1) Hungare: Ebredó magyarok gyűsülete (Societo de vekig'antaj Hungaroj). Notinde estas, ke 10-15 esperantistoj estas membroj de tiu societo.

lau' dataj pro persistemo kaj dankstaj por via frata helpemo kaj gastemo. Mi kunportos dolc'an memoron pri mia c'eesto inter vi. — Kaj nur bedau'ras, kevi metas iom tro da « paprika » en la mang'ajojn ! ! ..

München

La 23^{an} ni forveturis al la « urbo de la artoj » kie ni alvenas la 25^{an}. K^{do} Guihéneuf dau'rigas la voĵag'on al Paris. Karaj legantoj, c'u tiu traeu'rapa migrado ne s'ajnas iom tro longa ? Mi timas tedi vin per mia rakonto, Paciencu. Rapidege mi alpas'os laretroiran vojon.

Plej agrablajn kaj senzorgajn'tagojn mi pasigas en la c'efurbo de Bavario. Mu'nchen estas la plej pura el la urboj de mi vizititaj. G'i ankau' pli originalece aspektas ol la aliaj kaj certe meritas sian mondfamon. Kio lasos al mi plej fortan impreson estas la granda demonstracio okaze de la mortigo de Erzberger. Feraj au'tomobiloj, sekvataj de kavaliroj armiaj per longaj, feritaj stangoj, minace trairas la stratojn. C'i-tie aukau' la kapitalistoj estas bone s'irmataj. K^{do} Deu'bler detale rakontas al mi pri tio, sed. mi adiau'as lin kaj forkuras al :

Goppersdorf Burĝstädt

Kie atendas min k^{do} Rau'schenbach, malnova pioniro de espo kaj fervora komunisto. Li pardonu se mi nur mencias lian fratan akcepton. Mi devas rapidi dankante al la edzino al la filino kaj patre kisante la movig'eman knabneton.

Leipzig

Kvartaga restado meze de plej fervoraj kaj diligentaj samideanoj. Multon rakontindan mi spertas. Mi menci u nur unu maloftaj'on : familio el kvar personoj, kies esp o estas la kutima lingvo. Mi nomis gekamaradojn Vogt kaj liajn du infanojn. Plej interese estas au'di tiujn geknabojn, kiuj uzas nian lingvon pli flue kaj korekte ol multaj malnovaj, plenag'aj espistoj. K^{do} Vogt meritas plej sinceran lau'don pro lia persistemo.

Mia vizito al la *Popoldomo* lasas al mi tre fortan impreson. Antau' unu jaro tiu impona konstruaj'o estis forbrulata de la « Kappistoj », kaj jam nun g'i estas preskau' tute rekonstruita-lau' pli grandaj dimensioj kaj pli arta plano. Kiom admirinda estas la monoferemo de la laboristaro ! ..

Mi silentu pri la grandega stacidomo — la plej granda el Eu'ropo) pri la giganta porpatria monumento kaj multaj aliaj vidindaj'oj. Mi rapidu al.

Keln — Paris

Tuj elvagonig'inte oni staras antau' la fame bela Katedralo. Multe da anglaj, kelke dabelgaj kaj francaj soldatoj dej'oras au' promenas sur la stratoj. Mi do realproksimig'as al la blanka, militarista Francio. Sendube la germanaj patriotoj preferus vidi aliajn soldatojn. Koncerne min la c'eesto de tiuj soldatoj same impresas kiel tiuj de Budapest au' de München. C'iuĵ estas nur instrumentoj en la manoj de rabemaj kapitalistoj...

C'i-tie mi intencis viziti la k^{dojn} nur la tagon antau' mia forveturo Paris'on, por solece travagadi la urbon. Mia esp.a stelo malhelpis mian eble riproc'indan intencan. La duan tagon surstrate mi estis esperante salutata de S^o Hurler. Jen

mi estas denove en Esperantio, kies leg'oĵn mi devos obei. Mi estos devigata « propagandcele » fari vizitojn, c'eesti kursojn ktp... « Ni tuj iru al s^o Junker, del. de U. E. A. (1), ordonas mia samideana renkontito.

Jen ni sidas en la delegitejo kaj triope interbabilas pri nia esp. a afero, kompreneble. S^o Junker j'us legis en « E. T. » la rezolucion voe'donitan en Praha de la « Satanoj », ekmallau'das g'in kaj... surprizite sciig'as, ke la c'efa kulpulo sidas antau' li. « Ha ! bone, tre afable respondas, s^o Junker », vi nepre vizitu la komunistan gazeton « Socialistische Republik ».

Forestas la c'efredaktoro. K^{do} Bartels akceptas nin. Sciig'inte ke mi estas « Franca » komunisto, scivole li demandas min. Lerte tradukas s^o Hurler, kaj nedubeble tiu trikvaronhora, fakta pruvo de la tau'geco de esp. o tre bone efikas sur la skeptikan varboton.

El tiu interparolado mi notu nur du aferojn : 1^o la germanaj komunistoj opinias, ke la franca Komunista Partio ne estas sufic'e radikala ; 2^o ke la revolucio estas neevitebla, sekve de la germana bankroto kiu okazigos tiun de Francio. Mia vizito c'e la « Rheinische Zeitung », organo de la socialdemokratoj, ne tiel bone efikis, tial ke la redaktoro, parolas france. Li tamen diras, ke li estas favora al esp. o.

Kio interesis min dum mia restado en la okupita regiono estis sciig'i pri la opinio de la enlog'antoj rilate al la diverslanda soldataro. C'iuĵ demanditoj respondis ke la francoj estas la plij mals'atataj, precipe la oficiroj. « Ili tro rememorigas nin pri la niaj », ofte estis responde al mi. La prusan militarismon anstatau'as la Franca ! ..

Sed s'ajnas ke bagatele mi perdas la tempon. Mi rapidu forveturi al Paris, kie urg'a laborego atendas min.

Mi ne volas tamen forkuri ne adiau'ante S^{uon} Teo Jung, kiu venis el Horrem por saluti min, k^{don} Petersen, sek. de Lab. Grupo kaj alian k^{don}, kies nomon mi forgesis. C'iuĵ tri akompanas min al la stacidomo, portas mian valizon kaj g'is la ekveturo restas sur la kajo kvazau' mi estus deili malnova amiko. Esp.o faras tian miraklon. Tre kortus'ite mi adiau'as la samideanojn kal enpensig'inte lasas min kunporti de la vagonaro al Francio.

..

Jam de kelka tempo mi estas reveninta en la redaktejon de... « S. R. ». Pense mi refaris tiun traeu'ropan migradon, kaj nun mi demandas min : Kion pli impresan lasis al ci tiu sessemajna voĵag'o ? Senhezite mi respondas : La fakto, la granda, okulfrapanta fakto estas, ke c'ie la homaj estas samaj. Ec' la vestoj havas en c'iuĵ grandurboj saman formon, saman stilon. La modo pli kaj pli internaciig'as. Parisano, Budapestano estas sammode vestitaj. Samaj estas iliaj ridetoj, samkore ili vartas siajn infanojn. La homoj estas c'ie faritaj el sama karno, el sama sango. Same ili g'oĵas, same ili doloras, same ili mortas. *Nur la lingva malsimileco diferencigas ilin.*

Tiu aserto ne estas tamen plene vera. Ekzistas iu diferenco ; g'i estas la klasa diferenco. Franca kaj germana kamparanoj

(1) La unuan fojon dum mia voĵag'o mi vizitas del^{on} de U. E. A. Nenie mi bezonis ties helpon. C'ie mi trovis « laboristojn » helpemajn kaj sindonemajn.

estas tute samaj homoj. Laboristo el Paris kaj laboristo el Berlin aspektas tute same. Kaj ankau' Parisa kaj Berlina burg'oj s'ajnas esti el la sama deveno. Sed burg'o kaj laboristo el la sama urbo fremde aspektas unu rilate la alian.

Burg'oj kaj laboristoj ne vojaĝ'as en la samaj vagoj, ne log'as en la samaj hoteloj, ne vizitas samajn kafejojn. Ili eĉ ne havas samajn gestojn, unuvorte la klasa diferenco vidig'as en ĉiu detalo de ilia vivo.

La granda urg'a tasko estas fordetrui la klasan diferencon per la komunismo kaj per esp.o, kulturi en la homo la *homecon* ne la naciecon.

Alia impresio. S'ajnas ke mi ne g'uis libertempon. Se mi irus en arbaron, en malgrandan vilag'on je nur 20-30 kilometroj de Paris mi certe spertus pli grandan s'ang'on, ol en ĉefurbo malproksime je 2.000 km.

Rilate al nia esp.a movado ĉie mi konstatis, ke la religieca atmosfero en kiu kreskis esp.o ankoraŭ influas en la t. n. laboristaj grupoj. Kreig'is speciala spiritstato, kiu povus fariĝi dang'era en la manoj de lertaj ambiculoj.

Apenau' eklumetas la flamo de « nova sento ». En multaj detaloj observemulo povas konstati, ke senskonscia naciemo vivas en la esp. grupoj. Eksterlanda kamarado estas tro konsiderata kvazau' ambasadarado de la esp.istoj el sia lando. La verda flago ne forigis la aliajn flagojn sed nur *aldonig'is* al ili.

Restas multo, multego fareda. Al la laboro !..

E. A.

La Situacio de la laboristoj en Ĉinio

Antaŭ kelkaj jaroj la ĉina laboristaro ne konsciis pri sia servuteca situacio.

Tamen la gilda organizado jam de tre longe ekzistas en nia lando. Sed la gildanoj ĉiam kunvenis por adori sian idolon.

Lastajn du jarojn, dank'al propagando de socialismo, la laboristoj vekigis kaj fondis sindikatojn. Jam ekzistas tiaj organizaj'oj en s'anhaj, Hon-Kon kaj Kanton. La sindikatoj estas helpataj de socialistoj kaj anarkistoj, kiuj instruas, ke la kapitalismo estas granda malamiko de la laborista klaso, kaj ke por savi la laboristojn el la mizero estas necese fordetrui la kapitalismon kaj starigi komunismon.

Nune ekzistas en Ĉinio pli ol dek gazetoj kiel organoj de la laboristaro. La plej konataj estas : « The Social », ĉiutage eldonata en Kanton ; « La Laborista Movado » en Pekin ; « La Laborista Mondo » en S'anhaj ; « La Laboristo » en Kanton. La ĉi tri lastaj aperas ĉiusemajne. Krom tiuj, la revuo « La Voc'o de l'Popolo », « La Komunisto » estas ankaŭ disvastigataj inter laboristoj kaj vekigas ilin por sociala revolucio.

Strika movado estas kelkfoje tre vigla. La laboristoj jam sukcesis altigi sian salajron kaj mallongigila labortempon. Tamen nun ili ankoraŭ devas labori pli ol dek horojn potage ; nur la maŝinistoj en Kanton sukcesis ricevi la naŭhoran labortagon kaj dimanc'an libertempon.

Simpak.

NOTOJ

Kapitalismo

En. U. S. A, regas plej granda senlaboreco. Preskaŭ 9 milionoj da homoj troviĝ'as sen ia okupo. En Bostono, s-ro Urbain Ledoux komencis vendi homojn, kiel oni iam vendis sklavojn, kaj la publika vendo sukcesis. La sama sinjoro alvenis Novjorkon kaj komencis enkonduki la sklavvendon, sed la polico dispelis la alvenitan amason de preskaŭ 50.000 personoj, kaj eĉ ne permesis al Ledoux disdoni bulkojn.

La aliaj aferoj ankaŭ estas nur malg'ojaj. En Tulsa la blankuloj mortigis multajn nigrulojn, kaj cindrigis iliajn domojn, forpelinte ĉiun nigrulan personon el Tulsa dumnokte.

Nuntempe la gazeto « World en New York komencis publikigi seriozajn artikolojn pri la « Ku Klux Klan », la sekreta « maffia » de U. S. A., kies anaro konsistas el pli el kvincentmil da Usaanoj. Ili kunvenis dumnokte maskite kaj per sekretaj signoj, piedo kaj surĉevale, por kondamni ĉiun nigrulon kaj multajn katolikojn kaj hebreaĵojn. Tio daŭris jam de 60 jaroj. En la lasta jardeko ili komencis ankoraŭ kondamni la socialistojn kaj aliajn progresemulojn, kaj sin tute ne detenis de mortigo aŭ de detruado de rikoltoj, surpasadante grandajn ampleksojn de kulturkampoj per ĉovaloj. Ili kondamis la nigrulojn al laboro por malalta tagpagaĵ'o, kaj se tiuj rifuzis, iliaj domoj estis cindrigitaj. Tiu bando similas al la iamaj ruslandaj nigraj bandoj nur ke g'i estas pli multnombra kaj pli forta, kaj uzas rimedojn eĉ pli bestajn. La registaro pro la malkovro de la « World » nuntempe faras ĉion por trovi iliajn agojn kaj eble puni ilin, se tio estos eble.

Novulo.

El letero de Mendmigrantoj

Du holandaj samideanoj forbiciklis de Haarlem la 12an de Junio intence ĉirkaŭvojaĝ'i la mondon. Jam monatoj forpasis kaj niaj migrantoj povis fari spertojn pri la gastemeco de diversspecaj espistoj. Tion ili diras al ni en longa letero, kiun entute ni ne povas publikigi pro manko de loko. Ni nur citu la jenon :

« Ĉe laboristaj rondoj ni trovis ĉie kaj ĉiam kamaradojn, kiuj estis pretaj por helpi ; bedaŭrinde ni ne povas diri la samon pri aliaj rondoj. Ĉe burg'aj rondoj oni iom malvide observis nin. Kelkfoje tamen oni petis iom da subteno, oni kvazau' tute surdig'is. Tiuj homoj lernis esp.on por propra profito aŭ por amuzo. En Dresden, ekzemple, estis sveda profesoro, kiu vorté tre admiris la « kurag'on » de la du Holandanoj. Kiam pli poste ni prezentis al li karton, li pagis por g'i... 4 Markon !!!

Okazis ankoraŭ ke certa prezidanto rifuzis al ni paroli en esperanta kunveno pri la interna valoro, pri la fratigeo de esp.o. Tio sufiĉe montras la spiritstaton de tiaj espis.toj.

Vaganto



POEZIAĴOJ

La Angulo de l'Poetoj

AL BATAL'!

Revolucia himno de esperantistoj-komunistoj.

1

Lingvo de Internacio
Nia kara Esperanto,
Al la mond' revolucia
G'i promesas pacon sanktan.

2

Kredon, Amon kaj Esperon
Portas g'i al batalantoj,
Por eterna pac' kaj vero
Sur la tero militanta.

3

Al tulumonda unuig'o,
Al komuna familio,
Vokas g'i, al la frotig'o
La bomar' proletarian.

4

La popoloj de l'tutmondo
Unuig'as en batalo,
En komunan fratan rondon
Kontrau' burg'a kapitalo.

5

Kune kun proletarioj
Iru ni esperantistoj,
Kontrau' reg'oj familioj
Kontrau' imperialistoj.

6

Al batal'! — la civitanoj
De la verda familio,
Estu ni savideanoj
En l'afer' revolucia!

7

Antau' ni la Verda Stelo
Gvidas nin al renaskigo,

Al la rug'a flam' c'ielo
Al batal' por liberig'o.

8

Kune kun la komunistoj
En batal' internacian,
Portu ni esperantistoj
La standardon verdan nian.

9

Sur la kampo de l'batalo,
Nin kunigas nia lingvo,
Kaj la sanktan idealon
En la gloro ni atingu.

10

For, la dubojn — ne'utralismon!
En batal' internacia
Estu la Esperantismo,
Forta il' proletaria!

11

Rug'a Flamo de l'c'ielo
Estas signo al batalo,
Nia, kara Verda Stelo
Estas lasta venksignalo.

12

Do, antau' en! kamaradoj!
Vivu venk' de l'komunismo!
La eternaj Pac' kaj Amo
Vivu la Esperantismo!

Originale verkis N. M. Yvanov-Raljanov
(Nikolao Kapoblanka).

Prezidanto de Societo Esperantista en Urjum'o.

Respubliko Rusio.

Gubernio Viatka.

EKVEVU LABORISTOJ!

D. A. Klagin

Laboristoj ekvekig'u c'ar ni mang'i devas.
Estas tempo ke sin c'iu laboristo levas
Kaj malfermas la okulojn, kiel hom' konscia,
Por forpeli la rabistojn de l' laboro nia..

La tiranoj faras leg'ojn, kiuj nin premadas
Kaj pastraro c'utempe ilin nur helpadas,
Tial restis ni, mizeraj, subigitaj homoj;
Nun forpeli ni rabistojn de la niaj domoj.

Laboristoj c'iu loke, penu nin fratigi,
C'ar ni devas, fortojn niajn c'iam unuig'i.
La homaron laborantan, ni mem liberigos,
Se tiranojn, ni por c'iam, fine jam forigos.

Rimarko: Tiun c'i poemon oni kantas lau' la fame konaat
slava ario: Hej Slovane! au' lau' la pola himno: Jeszcze
Polska nie zgieniela! — Preskau c'iu slavo konas la melo-
dion.

Pri Jack London

Antau' kelkaj jaroj, la usonaj socialistoj perdis verkiston, bedau' rinde ne sufic'e konatan ekstere de l'angleparolantaj landoj. Tiu verkisto estas *Jack London*, precipe s'atata pro liaj noveletoj, en kiuj li pentris mirinde la vivon, lau' la vigla, humora maniero de vere usona sportisto.

Li vivigas siajn heroojn per vivo c'iam pura, forta, logike homeca. Li prikantas majstre la sanigan laboron kaj agon en c'iu verketo; kaj, de la unua linio g'is la lasta, la leganto s'ajne vivas sian legataj'on.

En unu el tiuj noveloj Jack London priskribas la vivon de l'unua tribo, kiu log'is en lando nomita de li *Marvalo*. Li montras la naskig'on de tiu tribo, post invado de najbaraj familioj, g'ian kreskadon kaj g'ian morton.

Plenan kurson pri Sociologio faras Jack London, en tiu verketo kelkpag'a, kaj tio lau' maniero tute simpla. Li amuzas instruante, kaj devigas la leganton al pripensado.

Lia heroo, la maljuna *Longabarb*, rakontas al siaj nepoj la historion de la lando sur kiu ili vivas. Li klarigas al ili kiel, sentinte la bezonon kunig'i siajn fortojn por sin defendi kontrau' nova atako de la Viandistoj, la Fis'istoj sin organizis. Li montras al ili la agojn de Hundodent, la reg'o; de Dikul, la c'efpastro; de Tigrokap, la estro de l'tiama armeo; kaj de la unuaj terposedantoj, industriistoj k. t. p.

La homoj tiutempaj multege similis la nunajn, kaj ni vidas, dau'rigante la legadon, kiel kreig'as la diversaj klasoj en societo.

Plej atentinda estas la unua poeto, patro de niaj profesiaj skribistoj kaj j'urnalisto, kiun Jack London nomas tiel prave *Cim*.

Vere domag'e estas ke nia lingvo tro racie logika, ne povas imiti, kiel la angla, kvazau' monosilaba kaj plena de onomatopeoj, la unuajn balbutojn de l'homo; tamen mi provis traduki la finon de tiu verketo, por ke la legantoj povu jug'i mem pri la maniero kaj celo de Jack London.

-- Sed kial vi ne ribelis, vi c'iu, kaj ne mortigis Trikrur, Dikul kaj aliajn por havi sufic'an mangaj'on? demandis Noktontimant.

— C'ar ni ne povis kompreni, respondis Longabarb.

Estis tro multe por pripensi, kaj ankaŭ estis la gardistoj, kiuj trapikis nin per siaj pikstangoj, kaj Dikul, kiu parolis pri Dio, kaj Cim, kiu kantis novajn kantojn, kaj kiam iu homo pensis rekte, kaj diris sian penson, Tigrokap kaj la gardistoj lin kaptis, kaj ligis al roko dum la maro forestis por ke, kiam g'i revenos, la akvoj lin dronigu.

Stranga afero estas la mono. G'i similis la kantojn de Cim. G'i sajnus tute tau'ga, tamen ne estis tia, kaj ni estis mallertaj por kompreni. Hundodent komencis kolekti la monon. Li amasigis g'in en domon, kun gardistoj por g'in gardi tage kaj nokte; kaj ju pli da mono li amasigis en la domo, des pli la mono plikarig'is, tiel ke homo laboris multe pli longe ol antau' por ricevi unu stringon da mono. Tiam ankaŭ, ni c'iam parolis pri milito kontrau' la Viandistoj, kaj Hundodent, kaj Tigrokap plenigis domojn per greno, sekigita fis'o, fumaj'ita viando kaj fromag'o. Kaj kun nutraj'oj amasigitaj kiel montoj, la popolo ne havis sufic'e por mang'i. Kio do okazis?

Kiam la popolo grumblis tro lau'te, Cim kantis novan kanton, kaj Dikul diris ke volo de Dio estis ke ni mortigu la Viandistojn; kaj Tigrokap kondukis nin al la limo, ke ni mortigu kaj estu mortigataj. Mi ne tau'gis por esti gardisto, kaj kus'i graso sub la suno, sed kiam ni militis Tigrokap estis felic'a nin akcepti.

Kiam ni estis formang'intaj la tutan amasigitan nutraj'on, ni c'esis batali kaj revenis por labori kaj fari pli grandan provizon da nutraj'oj.

— Tiam, vi estis c'iu, frenezaj, komentariis Cervocasist.

— Efektive ni c'iu estis idiotoj, konsentis Longabarb. C'io estis vere stranga. Estis ankaŭ *Fenditanaz*. Li diris ke c'io estas malbona. Li diris ke vere ni farig'is pli fortaj, kunigante niajn fortojn, kaj li diris, ke kiam ni formis la tribon, tau'ge estis ke la homoj kies fortoj minac'is la tribon estn senigitaj de sia forto — tiuj kiuj frakasis la kranion de sia frato, au rabis lian edzinon — kaj nun, li diris, la tribo ne plu fortig'as sed malfortig'as, c'ar estas homoj kun alia speco de forto, kiuj minacas la tribon; tiuj kiuj havas la forton de l'g'undo, kiel *Trikrur*; la forton de l'fis'kaptilo, kiel *Plataventr*; la forton de l'tuta *Kaproviano*, kiel *Porkamaksel*. La afero farota, diris Fenditanaz, estas fors'iri la malbonan forton de tiuj homoj; devigi ilin al laboro, c'iu, kaj ne permesi ke mang'u kiu ne laboras.

Kaj Cim kantis novan kanton pri la homoj kiel Fenditanaz, kiuj volis ke ni revenu al niaj kavernoj kaj arboj.

Fenditanaz tion neis; li ne volis ke ni iru malantau'en, sed kontrau'e antauen. Li diris ke ni plifortig'is nur kunigante niajn fortojn ke se ni, Fis'istoj, volus kunigi niajn fortojn kun tiuj de la Viandistoj, ne plu estus milito, kaj la gardistoj farig'us senutilaj, kaj c'iu homoj laborante, estus tiel multe da nutraj'oj, ke c'iu homo ne bezonus labori pli ol du horojn c'uitage.

Tiam Cim kantis denove, kaj li kantis ke Fenditanaz estas mallaboremulo, kaj li kantis ankaŭ la kanton de l'Abeljo.

G'i estis stranga kanto, kaj tiuj kiuj g'in au'dis farig'is frenezaj, tute kvazau' ili estus ebriaj de la fajrakvo. Tiu kanto parolis pri: abelaro kaj pri raba burdo, kiu volis vivi kun la abeloj, kaj forrabis ilian tutan mielon. La burdo estis mallaborema, kaj diris al ili ke estas senbezone labori; ankaŭ g'i diris al ili, ke ili amikig'u kun la ursoj, kiuj ne estas mielrabistoj sed nur bonaj amikoj. Kaj Cim kantis tiamaniere ke tiuj, kiuj, au'dis sci'u ke la abelaro estis la tribo de Marvalo, la ursoj estis la Viandistoj, kaj la mallaborema burdo estis Fenditanaz. Kaj kiam Cim kantis ke la abeloj au'skultu la burdon g'is kiam ili estis tuj pereontaj, la popolo murmuris kaj grimacis; kaj kiam Cim kantis ke fine la bonaj abeloj pikadis la burdon g'is morto, la popolo prenis s'tonojn kaj supers'utis Fenditanaz g'is kiam li malaperis sub monteto de l's'tonoj per kiuj li estis mortigata. Multaj el tiuj, kiuj longe kaj pene laboris kaj ne havis sufic'e por mang'i, helpis al s'tonmortigo de Fenditanaz.

Post la morto de Fenditanaz, estis nur unu homo kiu kurag'is starig'i, kaj diri sian opinion. Tiu homo estis *Vilavizag'o*.

Kie estas la forto de l'fortuloj? demandis li. Ni c'iu estas la fortuloj. Ni estas pli fortaj ol Hundodent, Tigrokap, Trikrur kaj Porkamaksel, kaj aliaj kiuj nenion faras kaj multe mang'as, kaj malfortigas nin per ilia forto, kiu estas forto malbona. Honioj kiuj sklavigis ne estas fortaj. Se la homo kiu malkovris unue la forton kaj uzon de l'fajro estus uzinta sian forton, ni estus liaj sklavoj, kiel ni estas hodiau' sklavoj de Plataventr, kiu trovis la forton kaj uzon de l'fis'kaptilo, kaj de la homoj kiuj trovis la forton kaj uzon de l'grundo, kaj de l'Kaprinioj, au' fajrakvo. Antau'e ni vivis en arboj, fratoj miaj, kaj neniu estis kvieta. Sed ni ne plu batalis unu kontrau' alia; ni kunigis niajn fortojn.

Nu! ni ne plu batalu kontrau' la Viandistoj. Ni kunigu nian forton kun la ilia. Tiam vere ni estos fortaj, kaj tiam ni eliros kune, Fis'istoj kaj Viandistoj, kaj ni mortigos la tigrojn, leonojn, lupojn kaj sovag'ajn hundojn; kaj ni pas'tos niajn kapriniojn sur c'iu montflankoj kaj plantos niajn grenon kaj grasajn radikojn en c'iu valoj. En tiuj tagoj, ni estos tiel fortaj ke c'iu sovag'aj besto forkuros de ni kaj pereos, kaj nenio kontrau'staros nin, c'ar la forto de c'iu homo estos la forto de c'iu homoj en la mondo.

Tiel diris Vilavizag'o, kaj ili mortigis lin, c'ar ili diris ke li estas sovag'aj viro, kiu volas reveni al la surarba vivo.

Tio estis vere stranga. C'iufoje kiam homo staris, kaj volis ke

ni entau'eniru, tiuj kiuj nenion faris diris ke li volas malantau'eniri, kaj ke li devas esti mortigata kaj la malfelic'apopolo helpis por lin s'tonmortigi. Ni estis stultaj. Ni c'iuuj estis stultaj, krom tiuj kiuj estis grasaj kaj ne laboris. La frenezuloj estis nomitaj sag'uloj kaj a sag'uloj estis mortigitaj. La homoj kiuj laboris ne ricevis sufidan nutraĵon, kaj tiuj kiuj ne laboris tro multe mang'is.

Kaj la tribo dau'rigis perdi sian forton. La in'anoj estis malfortaj kaj malsanaj, kaj, c'ar ni ne sufic'e mang'is, strangaj malsanoj falis sur nin, kaj ni mortis kvazau' mus'oj.

Tiam la Viandistoj revenis. Tro ofte ni sekvis Tigrokap c'e la landlimon kaj mortigis ilin. Nun, ili venis por sin reveng'i en sango. Ni estis tro malfortaj por defendi nian grandan muron, kaj ili nin mortigis, nin c'iujn; krom kelkaj virinoj, kiujn ili forkondukis kun si. Cim kaj mi estis savitaj. Mi kasig'is en la plej sovag'aj lokoj, kaj farig'is cas'isto, kaj de tiam mi ne malsatis. Mi s'telis edzinon de la Viandistoj kaj iris por vivi en la kavernoj de l'montoj, ke ili ne povu min trovi. Mi havis tri filojn; c'iu el ili s'telis edzinon de la Viandistoj. La ceteron vi konas c'ar, c'u vi ne estas filoj de niaj filoj?

— Sed demandis Cervocasist, kio farig'is Cim?

— Li vivas inter la Viandistoj, kaj farigis kantisto de kantoj c'e la reg'o. Li estas nun maljunulo, sed li c'iam kantas la samajn kantojn, kaj kiam viro starig'as por iri antau'en, li kantas ke tiu volas malantau'eniri kaj vivi en arboj.

Longabarb enigis sian manon en la ursan karkason, kaj per sendenta bus'o mang'is plenmanon de grasa'jo.

Iun tagon, li diris, vis'ante siajn fingrojn c'e siaj flankoj, c'iuuj frenezuloj mortos, kaj c'iuuj sanaj qomoj iros antau'en. La forto de l'fortuloj estos ilia, kaj ili kunigos siajn fortojn tiel ke el c'iuuj homoj en la mondo, neniu batalos kontraŭ la alia.

Tiam ne estos gardistoj, nek sentineloj sur la muroj, kaj c'iuuj rabobestoj estos mortigitaj. Kaj, kiel diris Vilavizag'o, sur c'iuuj montflankoj pas'tos sin la kaprinoj, kaj c'iuuj valoj inter la montoj estos plantitaj per greno kaj grasaj radikoj. C'iuuj homoj estos fratoj, kaj neniu estos mallaborema sub la suno, kaj estos nutrata de siaj kamaradoj. Kaj tio okazos, kiam c'iuuj frenezuloj estos mortintoj, kaj kiam ne plu estos kantistoj por resti kvietaj kantante la kanton de l'abeloj.

La Abelejo ne estas ĥomoj

La legantoj eble trovos tiun stilon iom infana sed ili sciu ke la heroo konfesas ke « tio okazis en tempo kiam ni ne havis ankoraŭ la vortojn por paroli kiel num ». La aŭtoro ankau' diras ke Longabarb ne diris precize la raportitajn vortojn, sed aŭdigis bruon kiu signifis la samon.

El la angla tradukis.

Else.

GRAVA AVIZO

La Kamaradoj bonvolu neniam forgesi, ke la Redaktoro zorgas pri la gazeto tute senpage, — malpage estus eble pli g'uste! — kaj nur dum siaj liberaj horoj. Estas nepre necese, ke oni helpu lin jenmaniere:

1-e C'iu artikolo au komunikaj'o devas esti tre legeble skribita kaj nur sur unu sola flanko de la folio;

2-e La Kamaradoj, kiuj ne estas tute certaj pri la korek-teco de siaj skribaj'oj, bonvolu prizorgi larg'ajn marg'enon kaj interspacon;

3-e La korespondantoj ne niam forgesu ripeti sian adreson en c'iu letero.

Por Komencantoj

PROVERBOJ (el la latina lingvo)

Kiu komencis, jam finis duone. — C'iu homo povas erari: sed nur la malsag'ulo persistas en sia eraro. — En malfelic'aj aferoj konservu animon trankvilan. — C'ion venkas la amo. — Pafarko trostre'cita tuj rompig'os. — La arto estas longa, mallonga la vivo. — Au'rora⁽¹⁾ estas amikino de la muzoj. — Oni ne altrudu bonfarojn. — Per konsento malgrandaj aferoj kreskas, per malkonsento disfalas la plej grandaj. — Pri la gusto oni ne povas diskuti. — Kiam vi estos felic'a vi havos multajn amikojn; nubo sur la c'ieloilin forigos de vi. — Kiel longe mi spiras, tiel longe mi esperas. — Kiam du malpacas, g'ojas la tria. — Oni mang'u por vivi, sed ne vivu por mang'i. — Lau' la oreloj oni ekkonas la azenon. — Malsato estas la plej bona kuiristo. — Malbona kokino demetas ovojn malbonajn. — Mortintan leonon ec' la leporoj insultas. — Ne elvers'u la akvon, antau' ol vi havas alian. — La lau'dantoj estas la plej dang'era speco de malamikoj. — Prudenta demando estas kazau' duona sag'aj'o. — Kiu ne progresas, tiu malprogresas. — Ripetado estas la patrino de l'sag'eco. — Ordinara barelo ofte enhavas bonan vinon.

FABLO (el la rusa lingvo)

Ermito, log'anta en la arbaro, amikig'is kun urso. Iutage ili kune migris tra la kampoj. La tago estis varmega, kaj la ermito lacig'is. « Kara amiko mia », diris la urso, « mi vidas, ke vi estas laca. Ni haltu sub tiu arbo, kaj en g'ia ombro vi ripozu iomete; kaj mi apudsidos kaj gardos vian dormon ». Tiel ili faris; kaj kiam la ermito estis ekdorminta, la urso eksidis apud lian flankon kaj per filika branc'o ventumis lin.

Jen alflugis mus'o kaj eksidis sur la nazon de la dormanto. C'agrene la urso forigis g'in per sia branc'o. Sed tuj g'i revenis, kaj kolere la urso g'in ree forpelis. Sed persiste — tiaj estas la mus'oj — g'i revenis trian fojon. Tiam la urso ne plu povis reteni sin. « Mizera bestaĉo! » g'i kriis. C'u vi ne c'esos g'enj mian dormantan amikon? » Kaj g'i ekprenis s'tonon kaj per terura frapego frakasis la mus'on sidantan sur la nazo de l'ermito kaj c'i-kune la kapon de sia amiko.

Memoru: Malsag'a amiko estas dang'era malamiko.

SERC'AJ'OJ

Trafa responde

Tri petolemaj junuloj renkontis maljunan hebreon, kiun ili volis fari objekto de sia moko. « Bonan matenon, patro Abrahamo! » diris la unua; « Bonan matenon, patro Isaako! » la dua; « bonan matenon, patro Jakobo! » la tria. — « Vi eraras, sinjoroj », respondis la maljunulo serioze; « mi nomig'as nek Abrahamo, nek Isaako, nek Jakobo. Mi estas Sau'lo, kiu eliris, por serc'i la azenojn de sia patro; kaj jen — mi trovis ilin ».

(1). Diino de la matenrug'o.

Nesolvebla tasko

En varieto imitisto de bestovoc'oj asertas al la publiko, ke li povas imiti la voc'on de c'iu ajn besto. Li jam blekis kiel s'afo, bojis kiel hundo, miau'is kiel kato, gruntis kiel porko, kvakis kiel rano, pepis kiel pasero ktp. Li petas, ke la au'dantoj donu al li plusajn taskojn. Unu momenton c'io restas silenta. Poste oni aŭdas bonhumoran basvoĉon: « Nu, krii unufoje kiel oleosardino! »

Saĝ'a Juĝ'isto

Juĝ'isto: Akuzito, kiom da fratoj vi havas?

Akuzito: Du fratojn, via Moŝto.

Juĝ'isto: Vi mensogis; c'ar via fratino diris al mi, ke s'i havas tri fratojn.

Milda mallau'do

La rusa poeto Pus'kin promenis iam kun junulo, kiu deklamis al li siajn malbonajn versaj'ojn: Jen renkontis ilin iu viro kaj oscedante preteriris. Tiam Pus'kin diris al sia akompananto: « Amiko, parolu iomete malpli lau'te... Tiu homo estas au'dinta vin! »

El « Tra la Mondo » de Paul Bennemann, internacia legolibro recenzota en nia venonta n°.

AKCESORAJ'O

Terura Rakonto

Iam mi voyag'is en *Calabre* (1); tio estas lando de malbonaj personoj kiuj, mi kredas, amas nenion kaj malamas precipe la Francojn.

Mi havis junan kunulon.

En tiu montoj, la vojoj estas abismoj; niaj c'evaloj mars'is kun granda malfacileco; mia kunulo iris antaŭ'en; vojeto kiu s'ajnis al li pli bona kaj mallonga erarigis nin. Ni serc'adis dum estas lume, sed ju pli ni serc'is des pli ni eraris, kaj estis mallumege kiam mi alvenis apud domon tre malluman. Tie ni trovis familion de karbistoj c'e mang'otablo, kie oni invitis nin tuj. Mia juna kunulo akceptis kaj ni tuj estis mang'antaj, trinkantaj, li speciale, c'ar miaflanke mi observis la lokon kaj la mienon de niaj gastigantoj. Niaj gastigantoj havis verajn mienojn de karbistoj, sed la domo? Vi estus kredinta vidi arsenalon: estis nur pafiloj, pistoloj, sabroj, tranc'iloj kaj tranc'ilegoj. C'io malplac'is al mi kaj mi ekvidis ke mi ne plac'is ankau'. Mia kamarado, kontraŭ'e, familig'is; li ridis, li parolis kun ili, kaj kun malsag'eco, kiun mi estus devinta autau'vidi, li diris unue de kien ni venis, kien ni iris, kiuj ni estis: Francoj! imagu iom! C'e niaj plej senkompataj malamikoj, solaj, perdig'intaj, tiel malproksime de ia homa helpo! haj poste por nenion kas'i, li s'ajngigis sin ric'an, promesis al tiuj personoj por la elspezoj kaj por niaj morgau'aj gvidontoj tion, kion ili volis. Fine, li parolis pri sia valizo petegante ke oni zorgu bone pri g'i, kaj oni metu g'in sub la kapkusenon de lia lito; li ne volis (li diris)

ion alian kiel kapkusenon. Ha! Juneco! Juneco! Kiom via ag'o estas rindinda! Oni estus kredinta, ke ni portis la diamantoj de la reg'krono!

Post la fino de la vespermang'o, oni lasis nin; niaj gastigantoj kus'igis sin malsupre kaj ni en la supra c'ambro en kiu ni mang'is. La kus'ejo, kiu atendis nin, estis subtegmento kien oni supreniris per s'tupetaro; g'i estis speco de nesto en kiu oni enigis rampante sub trabetoj kovritaj per provizaj'oj por la tuta jaro.

Nur mia kamarado supreniris kaj kusig'is dormante, lia kapo sur la grandvalora valizo. Miaflanke mi faris bonan fajron kaj sidig'is apud g'i c'ar mi decidis maldormi.

La tuta nokto estis jam preskau' pasinta trankvile kaj mi ektrankvilig'is, kiam c'e la momento kiam s'ajnis al mi ke baldau' tagig'os, mi au'dis malsupre de mi nian gastiganton kaj lian edzinon parolantaj kaj disputantaj, kaj au'skultante tra la kamentubo kiu rilatig'is kun tiu dela teretag'o, miau'dis tre bone tiujn proprajn vortojn diritajn de la edzo: « Nu, c'u mi devas mortigi ilin ambau'? » Al tio respondis la virino: « Jes! » Kaj mi nenion plu au'dis.

Kion mi diras? Mi restis apenau' spirante mia korpo malvarma kiel marmoro: vidante min, vi ne estus scianta c'u mi estas mortinta au' vivanta. Dio! Kiam mi pensas ankoraŭ pri tio! Ni ambau' preskau' sen armiloj kontraŭ ili, dekdau' au' devkkin kinj posedis tiom da ili! Kaj mia kamarado preskau' mortinta pro dormo kaj laceco! Veki lin, brui, mi ne kurag'is; forkuri sole mi ne povis: la fenestro ne estis tre alta sed malsupre du dikaj dogoj blekis kiel lupoj... En kia maltrankvileco mi trovig'is, tion imagu se vi povas!

Post unu kvaronkoro, kiu s'ajnis longa, mi au'dis iun sur la s'tuparo kaj tra la fendeto de la pordo mi vidis la patron, kun lampo en unu mano kaj en la alia, unu el liaj grandaj tranc'iloj. Li supreniris, lia edzino malantaŭ li. Mi, malantaŭ la pordo: li malfermis, sed antau' ol eniri, li metis teren sian lampon kiun lia edzino prenis; poste li eniris, nudpiede kaj s'i, ekstere, kas'is per siaj fingroj la tro grandan lumon de la lampo: « *Malrapide, iru malrapide* » s'i murmuris.

Kiam li estis apud la s'tupetaro, li supreninis, tenante sian tranc'ilon inter siaj dentoj: kaj alveninte apud la lito en kiu kus'is tiu malfelic'a junulo kun la gorg'o malkovrita, per unu mano li prenis sian grandan tranc'ilon kaj per la alia... Ha! Dio!. . Li prenis s'inkon kiu pendis je la plafono, tranc'is pecon kaj... eliris sammaniere kiel li estis veninta... La pordo fermig'is, la lampo foririskaj mi restis pripensante.

Tuj kiam tagig'is la tuta familio kun granda bruo venis veki nin kiel ni petis, ke ili faru. Oni alportis mang'aj'on: matenmang'on tre puran, tre bonan. Du kaponoj estis el la mang'aj'oj; ni devis, diris la gastigantino, mang'i unu kaj kunporti la alian.

Vidante ilin, mi fine komprenis la sencon de tiuj teruraj vortoj: *C'u mi devas mortigi ilin ambau'?*

Kaj mi kredas, ke vi havas sufic'e da sagaceco por diveni kion ili signifis.

Paul-Louis COURIER (franca verkisto, 1772-1825).

Tradukis G. HUGOT-RAISON.

(1). Parto de Italio.

Ni ne kompliku la lingvon

En lasta n-ro, ni legis artikoleon titolitan « Ni malkompliku ». Estas vers'ajne, ke tiu neesperanta artikolo celis montri, ke ofta uzo de prefiso *mal* ne estas belaj'o — lau' literatura vidpunkto.

Kiam ni uzas Espon c'u bus'e c'u skribe (mi povus diri: malbus'e) tio, kio estas plej altvalora « belaj'o » g'i estas la klareco. La cetero estas flanka afero. Seen skribpag'omi ekz. bezonas dekfoje aludi la beston t. n. elefanto, mi do dekfojn devos uzi la vorton « elefanto » kaj el tio mi vidas nenian literaturan malbelaj'on.

La verkistoj en franca lingvo tiel penadis por kiel eble plej « literature » verkadi, ke por ne tro ofte uzi saman vorton, ili enkondukis en la lingvon amason da tute senutilaj vortoj. Tiuj vortoj, kiuj ric'igis (?) la lingvon faris g'in treege malfacila. Ekz, malgrau', ke en la lingvo estas kelkaj prefiksoj montrantaj la malan ideon, niaj « lingvosciencistoj » elpensis tiom da vortoj por esprimi tiun ideon, ke oni denis eldoni vortaron... de la malaj vortoj! Pri sinonimoj estas same: speciala vortaro farig'is necesega! C'u en esperanto ni agos same?

Se en la lingvon, ni iom post iom enkondukus la malajn vortojn tronig'antajn niaj gepatraj lingvoj, ni baldau' povus forstrekii la prefikson *mal* Tiam la lingvo estus pli vortoric'a » kredeble pli « literatura » sed certe pli malfacila.

Oni ne diru, ke en Esp^o estas neeble esprimi c'ian penson. Kiam ni legas verkojn de la unuaj esperanto-verkistoj (Zamenhof, Grabowski, Kabe k. a.) ni efektive konstatas, ke tiuj aŭtoroj, c'u traduke c'u originale mirinde esprimis c'ian pensonuancon. Se ni pli konsideras, ke de tiam Esp^o ric'ig'is per tri vortaldonoj ni devas konfesi, ke el tio la lingvo farig'is ankoraŭ pli esprimpova. Kial do ni komplikus g'in enkondukante senutilajn vortojn?

Aliflanke « literaturo » lau' la plena senco de la vorto, ne ludas en la vivo rolon tiel c'efa, kiel oni g'in kutime opinias. Literaturo estas alpenso de burg'oj, kiuj plej ofte verkas ne kun nura celo simple kaj klare esprimi sian penson, sed precipe por patose miregigi la legantaron. La analfabetuloj Stephenson — kiu inventis (1) la lokomotivon — kaj Jacquard — kiu inventis la teksomas'inon — faris al la homaro servon senkompare pli gravan ol tiun, kiun faris kaj faras c'iu literaturistoj kune: ni do ne ellasu la kaptaj'on por la ombro!

Kiu plej klare verkas en Esp^o, tiu estas la c'efa Esp literaturisto; kiu senutile enkondukus superflujajn vortojn, tiu estus lingvofus'isto.

Dank'al uzo de kelkaj afiksoj, la esperanta vortaro —

(1) *Rim de la Red.* — S'ajnas, ke la aŭtoro de tiu artikolo ne estas plene konsekvenca kun si mem, Ekzemple, li uzas la vorton « inventi » kiu tute ne estas Zamenhofa kaj povas esti konsiderata de *nekomplikuloj* kiel senutila balasto. Ni petas la kamaradojn, ke ili estu libere-maj pri tiuj lingvaj aferoj. La vivo montras kiuj pravus c'u la komplikemuloj, c'u la nekomplikemuloj. Kin ne s'atas literaturon, tiu ne le gu g'in. Kaj li ankaŭ penu kompreni, ke oni rajtas opinii, ke Shakspeare, Goethe au' Tolstoj tiom utilis al la komaro kiom *Stephenson* kaj *Jacquard*, kiuj estis lau' socia vidpunkto veraj komplikemuloj.

kompare kun la naciaj — estas mirinde maldika. Tiu maldikecon ni c'iel s'irmu kontraŭ la naturan emon de literaturamantoj al « pliric'igado » de la lingvo.

Finante mi admonas la K-dojn uzi, uzadi Esp^o sed ne kompliki g'in.

J. Habert.

DIVERSAJ'OJ

PROPONO-ALVOKO

La Grupo Socialista Esperantista el Bilbao, str. San Francisko n° 9, konstatinte grandan indiferentecon pri esp. c'e la socialistaj rondoj, proponas 1°) En c'iu lando, kie ekzistas centra organizaj'o, estu komisiata k^{do} kies tasko estos verki artikolojn pri la situacio de la enlanda laboristaro; 2°) Tiuj artikoloj estu sendataj al c'iu eksterlandaj organizaj'oj; 3°) Estu Komisiata k^{do} kies tasko estos traduki tiujn artikolojn por la enlanda gazetaro; 4°) En landoj, kie ne ekzistas centra organizaj'o la bonvoluloj plenumu la c'i-supre definitajn taskojn.

Nia Grupo alvokas tiucele kaj sciigas ke jam g'i sukcesis ricevi de la redakcio de la semajna revuo « Luctia de Clases » promeson, ke tiuj per espo ricevotaj artikoloj estos publikigataj.

La Estraro de la Grupo.

MONDMIGREMULOJ

Junaj entuziasmuloj hungaraj intencas entrepreni mondmigradon « per s'ipo », kun la modesta (?) celo organizi la maristojn por ke ili farig'u « bonaj esp-istoj ». Tiucele ili sin turnas al « c'iu samideanoj » petante mondonacojn por ebligi tiun entreprenon. C'iu monero estu sendata al: *Adalberto Schuller*, Budapeŝt IX, Angyal-utea 18-1-17 (Hungario) — kiu alvokas je la nomoj de Frederiko Gora, Wilhelmo Balint, Emeriko Berimji.

PER KELKAJ VORTOJ

Lau' la peto de 13 s'tatoj; la *Ligo de Nacioj* decidis meti sur la tagordon de la proksimjara Kunveno la temon: *enkonduko de esp. o en la lernejoj*. La Sekretariejo de la Ligo estas komisiata verki raporton pri la g'isnuna divastig'o de esp-o.

La Internacia virina Kongreso Laborista okazinta lastatempe en Genevo decidis akcepti espon kiel oficialan lingvon por venonta kunveno en 1923.

La polica estraro de Dresden (Germ.) arang'is oficon por esperantlingva korespondado.

La Internacia Labora Oficijo, kies sidejo estas en Genevo, publikigas propagand foliojn kaj dokumentoj en esp-o.

La c'iuvara kongreso de Britaj Esp-istoj okazos en London je Pentekosto 1922. La Organiza Komitato atendas grandan sukceson, kaj pretigas por la gastigo de almenaŭ mil kongresanoj.

Propagandu c'iam, ne c'ie; klariĝu, ne prediku; rakontu faktojn, ne esperejn.

KRONIKO

Au'strio.

Linz. — Per plej bona helpo de la Munh'ena grupo estis malfermataj esp. Kursoj en Linz kaj c'irkau'aj'okaj fonditaj Lab. Esp. Grupoj. La prezidanto estas: K^{do} Sober, Linz. a. D. Humboldt, str-46.

C'eh'oslovakio.

Plzen. — Laborista Asocio arang'is du kursojn (80 pers). Instruas k-doj J. Pesek kaj J. Priban. Plue ni arang'is kurson en *Karlovo*. Instruas K. Snajdr, (15 pe). — Laborista Gimnastika Asocio en *Letna*, apud Plzen, arang'is de 2^a gis 9^a Oktobro ekspozicion en granda halo de laborista domo. Ankaŭ Esp. Lab. Asocio partoprenis per gazetoj, libroj kaj propagandiloj, kion prizorgis k-doj Peck el Plzen kaj Burda el *Letna*.

Jurnalo « Nova Doba » alportis jenan raporton: « Direkcio de s'tataj fervojoj en Plzen eldonis la 10 sept. 1921 c'i tiun ordonon »: *Ministerio de fervojoj en sia decido* (30 agosto 1921 ĉj. 45.959 pres. 12). konstatis, ke laboristoj en kelkaj regionoj ellernis esp. on tiel, ke ili povas kun alveturantaj fremduloj, interkomprenig'i per tiu c'i lingvo... Estas rekomendate al la ofiscistaro, kiu interrilitas kun vojaĝ'antaj fremduloj, ke ili dedic'u al lernado de esp. o apartan atentemon — « *Karel Mudra*, raportisto de la Lab. Asocio.

Košice. — La komunista Partio arang'is esp. an kurson, kiun c'eestis 70 magiarlingvaj lernantoj. Sed iu raportis al la Polico, ke la komunistoj uzas la kurson por siaj sekretaj kunvenoj. Sekve de tiu demando la policistaro vizitis (26 sept.) kaj arestis la gvidantojn kaj la lernantojn de la kurso. Post zorga demandesploro ili estis liberigataj, sed tamen la esplorado dau'ras kontraŭ ili.

Francio

Marseille. — Kontentiga estas la esp. a movado en nia urbo. Ekzistas « Intersindikata Grupo kaj S. A. T. grupo. Precipe la kursoj de « I. G. » (oficiale faritaj de la Laborborsetraro, kiu organizas c'iuĵare « metiaj kursojn » enkalkulante esp. on) bonege sukcesis kaj gelernintoj ricevis premiojn. La loka gazetaro publikigis artikolojn pri la disdonado de l'premioj kaj citis la nomojn de niaj samideanoj *Christine* (blindulo) kaj *Lautheauve* (60-jarulo) mirante kaj lau'dante pri ilia sindono al esp. o. — El komunisto de K^{do} *Moreno*.

Paris. — Lastatempe K^{do} Raguier faris paroladojn pri esp. o c'e 4 sekcioj de la Komunista Partio, c'e Kom. Junularo el Courbevoie, c'e kom sekcio el Puteaux, c'e Kom. Junularo el la XI^a kvartalo. Kursoj okazas nun c'e 7 komunistaj organizaj'oj en Paris kaj c'irkau'aj'oj. — Kursoj organizitaj de la *Esp. Rev. Grupo Parisa* okazas nun c'e 5 diversaj lokoj. Okazas ankaŭ speciala kurso por militintoj c'iumarde c'e la sidejo de la Asocio, kurso per korespondado farata de K^{do} Robert kontentige dau'ras.

Strasbourg. — Nia grupo ne estas tre multnombra (20 anoj), sed tre vigla. Ni kunvenas c'iu du semajne kaj organizas kursojn franca-kaj germanlingve. De la urbestro ni ricevis c'ambro en la Popollernejo Schœpflin por fari la

kursojn. La 26 novembro okazos en la c'ambrego « Aubette » publika kunveno organizata de nia grupo. Plue g'i aperigis en la komunista gazeto « Neue Welt » grandan artikolon pri esp. o de nia K^{do} Schmitt. — Delegito de la Grupo estas nun: G. Bohin, 31, rue de Sarrebourg. Schiltigheim (Bas-Rhin). G. B.

Finnlando.

Tampere. — Antaŭ nelonge fondig'is Esp Lab. Societo (75 anoj) kies titolo estas « Autaŭ'en » kaj la sidejo c'e la « Laborista Domo ». C'iuĵ samideanoj estas petataj donace sendi esp. verkojn kaj literaturaj'ojn por starigo de biblioteko. Oni sendu c'ion al la Sekretario: *Arne Lunstrom*. Papinkatu 8.

Germanio.

Augsburg. — Raporto pri la esp. a kongreso aperis en la popolgazeto. K^{do} K. D. el München faris paroladon sekve de kiu esp. a kurso estis malfermata — (45 p.) Preskau c'iuĵ kursojn alig'is al la grupo. — *Herbert Hofmann*, Schieplerstr. 15/1.

Fraunstein. — La grupo tre energie laboras por ke c'iu ano estru perfekte la lingvon. En urbeto nia anaro estas ankaŭ malgranda sed des pli konvinkita pri la neceseco de nia movado. Nova kurso komencis: Frau'lino Huttinger, Chreilshheimerstr. 2.

Munh'eno: Post vigla aŭ tunpropagando ni malfermis sep esp. kursojn entute c'eestataj de 140 gekursanoj. Speciala kurso por kursgvidantoj ankaŭ estis malfermata, (12 p.) Jam estas fondita nova grupo en la urbeto Miersbach. El aliaj lokoj jam anoncis sin interesuloj. — K. D.

Hispanio.

Barcelona. — Kau'ze de eksplodo okazinta la 5 aŭgusto, la Grupo « Libereco Kaj Kulturo » ricevis kvar vizitojn de la polico. Kvankam pli ol du monatoj jam forpasis dum kiuj la polico povis sufiĉe konvinkig'i pri sia eraro tamen « Libereco Kaj Kulturo » havas ankoraŭ la pordon s'losita kaj sigelita pro ordono provinca. Tial kion oni sendos al nia Grupo certe perdig'os. — Luci Revo.

U. S. A.

New-York. — La 15 septembro fondig'is nova grupo por la disvastig'o de esp. inter la rondoj socialistaj komunistaj kaj progresemaj. La nomo de la societo estas: *Esperantista Laborista Centro*. Estis decidite ke c'iu ano de g'i estu samtempe ano de S. A. T. kaj ke oni c'eestu en ties internaciaj kongresoj.

Municioj ricevitaj por. S. R. (de 1^a gis 30 Oktobro)

Francio — Caillet 1 fr. — Camescasse 1 fr. — Aumeunier 1 fr. 25. — Olozanski 0 fr. 40. — Hugot Raison 1 fr. — Solsona 11 fr. — F. Henry 1 fr. — A. Bouchard 1 fr. — Brochet 1 fr. — Poirier 2 fr. — Raguier 1 fr. — Coldefy 6 fr. — Fino Besnard 1 fr. — Baronnet 2 fr. 50. — Perfetti 1 fr. — Dejust 11 fr. — Hobej 2 fr. — Fino Olivier 3 fr. — L. Bomberault 4 fr. — Fino Van Haltem 3 fr. — H. Sylvain 1 fr. E. — Lanty 100 fr. — Glodeau 20 fr. — Satano 300 fr. — J. Habert 41 fr.

Norvegio. — Martin Maribo 10 fr.

Germanio. — Vildebrand 2 M. — Allès 6 M. — Linkman 1 M. — Richter 32 M. H. M. 3 M.

Sume. — 527 f. F. 15 × 44 Marks.

Rimarkinde estas. — Ke dum tiu monato nur la Francoj, Germanoj, kaj Norvegoj monhelpis S. R.

Restas ancorau' kelkaj n-roj (Julio-Augusto) de L. E., et luksa papero, kun portreto de H. Barbusse, po 2 fr. fr.

Ac'etante tiun n-ron, vi helpas la vivon de *Sennacieca Revuo*. Petu g'in al K-do Glodeau 177, rue de Bagnolet, Paris XX^e.

Per la malsatoj-Rusianoj

Kdo M. Muribo (Kristiania), 10 fr. fr.

Unu konsileto !!...

Multe da Kamaradoj kiuj ne legas, au' ne scipovas legi la financajn gazetojn estas tre embarasataj por sendi al ni la ekvivalenton en sia landaj monunuoj de ia monsumo en francaj frankoj Tamen, nenio pli facila. Ekz : iu germaniano deziras ac'eti unu ekzempleron de « **Tri verkoj de Tolstoj** », kiu kostos 1, 10 fr. fr. (por S. A. T. ano); nu, en iu ajn banko li ekscios kiom da germ. markoj valoras 1, 10 fr. franko. (je la 28-10 1921, 1,10 fr. fr. 14 germ. mk). Li do enmetos tiom da papermarkoj en koverto, kiun li adresos (registrita prefere) al **Sennacieca Asocio Tutmonda, 23 rue Boyer, Paris.**

Al niaj abonantoj

Ni petas ke ĉiuj abonantoj kiuj estas informitaj de nia administracio pri finig'o de sia abono, bonvolu kiel eble plej baldau' sendi sian reabonon por eviti al si interrompon en la ekspedo kaj al ni senutilajn klopodojn.

Sennacieca Asocio Tutmonda

23, Rue Boyer, Paris XX^e

OFICIALA INFORMILO

Celo : Utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto, por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda (vidi la statuton).

Jarkotizo : Lau' valoro de unubora salajro meza = Anglio, 17 pencoj; Austrio, 42 kr.; Belgio kaj Francio, 2,50 fr. fr.; Bulgario kaj Rumanio, 8,50 lev.; Ĉeĥ'oslovakio kaj Jugoslavio, 7 kr.; Danio, Norvegio kaj Svedio, 1,70 kr.; Germanio kaj Finnlando, 7 Mk.; Hispanio, 2 pes.; Hungario, 17 kr.; Italio, 3,40 lir.; Nederlando, 0,85 Guld. Pclio, 85 Mk.; Svisio, 1,70 fr.; Usono, 35 cend., k. t. p.

Membreco kaj jarabono al « Sennacieca Revuo » : Multobligu la tarifon de membro per 4. — Ekz. : en Germanio, membro pagas 7 Mkg., membro-abonanto 28 Mkg.

(La landoj, kies monkurzo estas malfavora rilate al franca franko, pagu prefere per naciaj monbiletoj, en registritaj leteroj; la aliaj lau'vole).

**

I

Voc'donado pri la nova statuto. La 8 novembro, c'e la sidejo de S. A. T. 3 Kamaradoj, membroj de la iniciatora Komitato, kunvenis por kontroli la rezultatojn de la voc'dono.

Elimininte la respondojn kiuj ne konformig'is al kondic'oj presitaj sur la cirkulero, tiu Komisiono kalkulis 210 voc'donilojn valorajn.

El tiuj 210, 186 deklaras plene aprobi la projekton de statuto prezentatan de la iniciatora Komitato, kaj akceptitan (kun iuj modifoj kaj aldonoj) de la Kongreso en Praha.

La ceteraj voc'oj aprobas... kun diversaj rezervoj, el kiuj la plej interesajn ni c'i-sube represas (sen komento).

C'ar la absoluta plimulto el la voc'donintoj estas favora, la projekto de statuto estas do nun *firme akceptita*.

II

El 450 voc'doniloj (tiom estas la nombro de S. A. T. anoj la 1^{an} septembron) dissenditaj revenis proksimume la duono. Ni scias ke iuj cirkonstancoj malpermesis al kelkaj partopreni la voc'donon; tiel, en du landoj premegataj de blanka teruro, kelke da tieaj Kamaradoj ne ricevis aŭ ne aŭdacis resendi la voc'donilon; aliaj g'in ricevis tro malfrue pro momenta forestado aŭ adres'ang'o, k. t. p....; sed tiuj esceptaj kazoj neniel senkulpigas la tro nombrajn membrojn, kiujn nenio devigis « muti ». Ni citu nur ekzemple la 51 membran grupon de Troyes (Francio) el kie revenis nur 3 voc'doniloj !!! Certe, la samaj postulus la voc'donrajton se ili g'in ne g'uus !!

Tia indiferenteco c'e tiom da Kamaradoj estas tre bedaŭrinda, c'ar la vivo de la Asocio dependas senpere de la sindonemo kaj aktiveco de siaj membroj; g'i tiel estos, kiel volos g'ia anaro. Tro da el ni ripozas sur alies aktiveco: dang'erplena peko. Precipe, en la komenca periodo, necesas ke c'iu membro, senescepte, alportu sian parteton, oferu sian peneton al nia Konstruaj'o.... Kaj s'ajne, partopreni c'iuajn voc'donojn kaj publikajn debatojn de S. A. T. estas facila devo.

III

Jen kelkaj proponoj aŭ kritikoj formulataj de la membroj « aprobantaj kun rezervoj ».

1) — 7 voc'oj el la Lyon'a grupo deziras ke « S. A. T. estu Federacio el la Grupoj kiu gvidadus la asocion dum 1 jaro — Pri la propagando nacilingva, en c'iu lingva regiono unu el la grupoj prenis sur sin la taskon, helpita mone de la tuta Federacio... »

2) — 6 voc'oj el la Münchena grupo proponas — a) aldoni sub « celo » la jenon « ... propagandi kaj instruadi la lingvon esperanton c'e la gelaboristaro... » — b) sub « organizo » « ... starigo de « por-esperanto » komisionoj en la samlingvujoj... »

3) — same de unu Berlin'a membro.

4) — same 3 voc'oj de Strasburg; plie... « c'iu ano de S. A. T. estu devigata deklari al kiu proletaria organizaj'o li apartenas »

5) — 1 Estonia membro jug'as tro elasta la unuan artikolon el la statuto « oni difinu kian laboristspecon estos enakceptata »

6) — 1 bulgara komunisto postulas precizigojn pri la direktoj socia-politikaj alprenotaj de la Asocio « c'u kun la 3^a, au kun la 2^a Internacio. ? ».

7) — fine, malsamaj opinioj kaj pluraj proponoj pri la titolo de la Asocio. Inter aliaj la grupo de Marseilles preferus konservi la malnovan titolon.

IV

Jam kelkaj membroj aludas kaj petas al ni sciigojn pri la venonta Kongreso de S. A. T. — Certe ni ankaŭ pripensas, sed ni danke ricevos kaj ekzamenos c'iujn sugestojn kaj proponojn pri tio.

Laŭ opinio de kelkaj S. A. T. anoj en Dresden « Kongreso en 1922 estos senutila; 1922 estu varbada jaro... »

« Okazigi g'in en mezeŭropo... for de l'burg'a Kongreso » deklaras la grupo de Kristiania kiu, jam sin preparis ekon o-mie por sendi delegitojn (*bonega ideo!*).

« Pasko 1922 en Düsseldorf » proponas la Frankfurt'aj Kamaradoj.

G'is nun, ni ricevis neniun precizan proponon; tamen el c'iu aludoj pri tiu demando, la plimulto akordig'as en tio ke la 2^a kongreso de S. A. T. okazu ie en mezeŭropo dum aŭgusto aŭ septembro 1922. Tia estas ankaŭ la opinio de la iniciatora Komitato.

Kiu grupo de Mezeŭropo (Germanio, Ĉekoslovakio k. t. p.) akceptos la taskon organizi nian duan Kongreson? Ni atendu forman inviton.

V

Ni ripetas ke, la kandidatoj al Komitato (konforma al plano de sektoroj) devas tuj sin deklari al sekretariejo kiu sendos al ili « demandaran formulon ». Kelkaj grupoj ne ankoraŭ respondis al nia cirkulero speciala pri kandidato.

VI

Responde al nia noto en oktobra N^o pri la jarlibro de S. A. T., ni jam ricevis bonajn ideojn; ni atendas aliajn... sed vi rapidu c'ar ni intencas g'in eldoni tre baldaŭ.

Kompreneble, la adreso de c'iu S. A. T. ano estos *senpage* enpresata en la "oficiala" parto de la jarlibro, sed kiuj deziras enpresigi sian adreson en la "koresponda" parto, tiuj devas pagi laŭ la jena tarifo: la adreso, kaj ne pli ol 10 vortoj = valoro de jarkotizo al S. A. T. (vidi supren); por c'iu plua deko da vortoj = 2/3 el jarkotizo. Pri eventualaj anoncoj, sin turni al sekretario.

La Sekretario de S. A. T.

Korespondado

Argentino

K^{do} Barrot Antono, Congreso 5155, Buenos-Ayres, k. c. l.

Ĉekoslovakio

F. Vican, Premyslovec 496, Mar. H. Ory. — M. Ostrava. — Pi. L. Esp-aj'o. K. c. l.

Gekursanoj deziras korespondi: sin turni al K^{do} Josef Répaszky, Baesaryiko ulice 33, Kosice.

Francio

Al rusaj Kamaradoj! K^{do} Hugot-Raison (Ecole Cours Jacquin, Troyes, Aube) dankas denove c'iujn rusajn kamaradojn kiuj sendis al li let. Li ankoraŭ provis respondi, sed denove liajn korespondaj'ojn resendis al li la franca posto. Rusaj amikoj, ne sendu plu viajn sendaj'ojn *senpere*. Trovu iun en alia lando kiu resendos al mi viajn leterojn. Ankorau' dan kon kaj koran saluton! G'is baldaŭ'.

Germanio

Fried. Gauch, Sossenheimerstr, 6. Frankfurt a/M Pt, — pk, — L, pri socia movado. Tuj respondas.

Ludwig Puff, Iosbacherstr, 20 ptr. Frankfurt a/M k.c.l., pri aktualaj demandoj, naciaj socimovoj kaj kutimoj.

Fraŭlino Louise Geisel, Sprendlingen (Kreis Offenbach a/M). Eisenbahnstr, 53 ptr. P.i aristaj, — l. pri socia movado, moro k.c.l. kun gejunuloj.

K^{do} Hans Kappelmann, Waisenhausstr 21. Dresden Pi, L. pri pacifista movado.

K^{do} Max Greutzner, Bischofsweg 104, Dresden Pi. L. pri sociaj progresoj.

Fritz Menz. Heumarkt 6, Magdeburg, pri muziko, teatro K c' l. L. Pi.

K^{do} Alfred Krause, Artilleriestrasse 4, Magdeburg; Pk., L., precipe kun rusoj, japanoj, c'inoj pri laborista movado; Esp. gaz. — Ĉiam respondas.

Kino Frinjo Brodauf, Kaiserstr. 53, III, — Leipzig-Lindenau L., pri socialismo.

K^{do} Richard Wagner, Lütznestr. 7, — Markranstadt; L., kun seriozaj homoj.

K^{do} Christian Schmid, Ingolstadt.

Kino A. Siedzielorz, Hahnemannstr. 18 ptr. I., Leipzig-Lindenau.

Hungario

K^{do} Adalberto Schuller, IX. Angyal utca 18-I-17. Budapest petas, ke oni sendu al li adresojn kaj interesojn por siaj 35 gelernantoj.

Rusio

Rusaj post-telegraf-telefonkaj radiotelegrafistoj, unuigitaj en ligo deziras interrilati kun c'iu kolegoj el la tuta mondo. Korespondaj'ojn oni adresu: **Ruslando, Moskvo, Ĉudovskoj 6, Esperantista Oficejo c'e Centra komitato de Ligilo.**

K^{do} Samajlov Aleksandr, Sbornaja 9^a kv. 7, Simbirsk, pri diversaj temoj.

Siberio

K^{do} A. Bzinikin, Blagoves'-Ĉensk. — Uc'itelskaja Seminarija deziras ricevi precizajn informojn pri la vivkondic'oj de la francaj laboristoj por publikigi ilin en la rusaj gazetoj.

K^{do} A. GORDEER, strato Respubliko detikij Prijust n^o 7 (Orfejo) Omsk pri moro, ludo, lernado, muziko, ktp..

Svisio

S^{ro} E Zürcher, Studento, Les Breuets (Neufchatel). P. i. PM. K. c. l. tuj. resp.

C'iu klabenscia kaj klabsekvenca esperantisto devas aniĝi S. A. T. !

Petu la novan statuton.

Mendu viajn librojn c'e nia librejo (petu katalogon)

Paĝi regule sian abonon estas la unua devo de ciu leganto.

BIBLIOGRAFIO

Libroj, Bres'uroj

La Tradition Socialiste en France et la Société des Nations de J. L. PUECH kun prefaco de Ch. GIDE, profesoro c'e la Franca Kolegio. Eldonita de la firmo GARNIER, 6, rue des Saints-Pères, PARIS. Formato : 12×19 cm. 228 p. Prezo : 7. 50 fr. fr.

La au'toro, social-patrioto, bonintencita pacifisto, fidus al *Ligo de Nacioj* por starigi definitivan pacon. Li celas pruvi, ke la unuaj, la francaj socialistaj pioniroj, SAINT-SIMON, CONSTANTIN, PECQUEUR, Pierre LEROUX, PROUDHON, difinis programon kaj politikon por *Societo de Nacioj*. Francio devas glori pri tio. Samkiel Foch venkis Ludendorff Proudhon ankau' venkis Karl Marks!..

Tiu libro estas tamen interesa pro la multaj historiaj punktoj diskutataj; g'i estas bona rezumo pri la historio de la doktrinoj de internacia politiko. La dokumentado s'ajnas serioza pro la bibliografiaj notoj. Sed oni ne devas forgesi, ke el verkaro tiel vasta kiel tiu de Saint-Simon au' Proudhon estas facile c'erpi qion oni deziras por pravigi iun ajn lezon.

Nun du politikaj potencoj sin interdisputas la regadon de l' Mondo : la III^a Internacio kaj la *Ligo de Nacioj*. La au'toro poentas sur la lastan potencon. Rulig'u la historia radego — kaj decidu.

La Lastaj Tagoj de D^{vo} L. L. Zamenhof kaj la Funebra Ceremonio. Eldonis A. OBERROT MANKAJ *Teo Jung*. Formato : 13×17 cm. 48 p. Kartonita. Prezo : 17 g. mk. afrankite. Mendebila c'e « Esperanto Triumfonta » *Holn-Horrem* (Germanio).

La sur luksa papero presita libreto estas zorga kompilo de nekrologoj pri la Majstro kaj pri liaj lastaj suferplenaj tagoj. Plie g'i enhavas dek fotografaj'oj'n de la enteriga ceremonio kaj sur la una pago la portreton de la amata formalaperinto. C'iu' esp. istoj volas havi en sia biblioteko tiun tre rekomendindan verketon.

Gvidlibro tra Trentino de D^{no} Cesare BATTISTI el la itala tradukis D^{no} A. MONDINI. Ric'e ilustrita 277 pag'a verko eldonita okaze de la VI^a nacia kongreso de italaj esp. istoj. Prezo : 5 it. liroj., 3 sv. fr. Havebla c'e *Giovannini Marehetti*, Via S. Maria Maddalena n° 16/II Trento (Italio).

Por nedividita germana Supera Silezio. — Protest kunveno kontrau la Perforto al Supera Silezio. — La kartludo pro Supera Silezio.

Tri brosjuroj eldonitaj de *Nova Esp. o — Eldonejo*, Berlin 1921. Formato : 16×23 cm. La unua kaj la dua estas 32 pagaj, la tria 24 pag'a. C'iu' kostas po 3 Mk.

Esperanto-Katalogo eldonita de *Esp. o Verlag Friedrich Ellersiek* Berlin S 59. Wissmanstr. 46. Formato : 11×15 cm. 32 p.

Gazetoj

Oficiala Gazeto Esperantista (n° 3, 4) 51, rue de Cluhy, PARIS. — Enhavas « oficialaj » (?) decidojn qaj komunikojn. En la n° 3, estas precipe leginda kaj studinda la bilanco pri la X^a ne okazinta Kongreso. Ni ne povas deteni nin represi parton pri « elspezoj » :

Oficistaro	20.525.90
Reklamo kaj presaj'oj	6.855.85
Kongresejoj	4.214.95
K. K. K.	4.000
U. E. A.	1.850
Kongresa Gazeto	2.756.40
Insignoj	1.579.90
Kongresa Libro.	1.975
Diversaj elspezoj	2.683.10

46.441.10 fr. fr.

En alia parto ni legos, ke la sumo de la enspezoj estas : 85.095 kaj tiu de la elspezoj : 70.701.80. Oni ne forgesu he tiuj sumoj rilatas al la autau'milita valuto kaj al ne okazinta Kongreso. — Kaj ankau', ke multaj klopodoj estis faritaj tute senpage de naivaj bonvoluloj.

Nia kolego « Le Monde Esp. iste » diris pri tio, ke la arang'intoj de tiu kongreso estas s'telistoj.

C'u do estus vere? Kial la kulpigitoj ne persekutas S^{no} A. Frechas antau' jug'istaron?

C'u do la poverbo: Kiu silentas, tiu konsentas « estas tinokaze vera? ».

Ni do rediru: *la arang'intoj de la X^a Kongreso estas s'telistoj.*

Esperanto Triumfonta. Koln-Horrem (Germ.) La ciusemajua gazeto aperas de la 55^a n° pligrandigita kaj plibonigita. G'i nun aspektas kiel grandformata ciutag'a gazeto. Sub tiu aspekto g'i plejege tau'gas kiel propagandilo. Ni devas precipe lau'di la redaktoron, S-ro Teo Jung, pro tio ke g'is nun li sciis resti vere nen'tra, rilate al la disvolvigo de esp. o en diversaj medioj. Tio estas maloftajo c'e la t. n. neu'traj esp-o-gazetoj.

D^{er} Arbeiter-Esperantist (n° 10). En germana kaj esp. a lingvoj. Legindaj artikoloj: *Evolucifazoj de l'homaro*; *Natureco kaj prudeco*; *Kongresenpresoj* (K. D., München) *La Virino en Rusio*.

Agitanto, rusa esperanta revuo de Kronstadta grupo de Sovietlanda Esperantista Unuigo. Adreso: Kronstadt (Rusio) Visokaja ul., 27, log. 2 (n° 2) Prekau' tute en rusa lingvo.

Esperanta Informilo. Dusemajna organo de Petrograda Societo Esperantista. Redakcio: K^{doj} V. N. Devjatnin kaj N. K. Karatajev. Administracio: K^{doj} V. G. Mikli kaj Cace. Adreso: Petrogrado, Italjausha, 21 — Preskau' tute en rusa lingvo.

AVIZO

De du landoj eŭropaj — kie regas nune la blanka teruro — ni audis kelkajn plendojn pro nereguleco en la ekspedado de la gazeto. Jen ties kaŭzo: plurfoje ni ricevis sinsekvajn ordonojn tute kontraŭajn, 1) « sendu nenion c'ar polico persekutas la proletariajn esperantistojn... » 2) « vi povas sendi libere... » 3) « atentu... » k. t. p., iafoje 3 malsamaj ordonoj en la daŭro de unu semajno. Certe ni komprenas la necertan situacion de tiuj kamaradoj, sed... koncerne la gazeton, ni ne scias kion fari.

Se vi deziras seriozajn korespondantojn, enpresigu vian adreson en la unua jarlibro de S. A. T. (vidu la tarifon en la " Informilo de S. A. T.).

Le Gérant, E. LANTY.

Imprimerie M. REMY. — BAUGÉ (Maine-&Loire). — Francio